# Travidebla ruĝa rafano

verkis Mo Yan

(Nobel-premiito por literaturo 2012)

elĉinigis Vejdo

eLibrigita de Elerno

Dec. 2012

Chongqing, Ĉinio

# I.

Aŭtuna mateno. Peza humideco formigis maldikan tavolon da travideblaj rosoj sur herboj kaj tegoloj. Jam ekaperis kelkaj flavetaj folietoj sur la soforo, kaj al ĝi pendanta ruĝe rustplena sonorilego malsekiĝis pro rosoj. La grupestro de la vilaĝo, surportante subŝtofitan jakon, kun sorgfaruna platkuko en unu mano kaj senŝeligita ĉina cepo en la alia, malrapide iris al la sonorilego. Kiam li iris sub ĝin, li jam formanĝis ĉion en ambaŭ manoj kaj liaj vangoj pufiĝis kiel tiuj de maljuna kampmuso transportanta grenon. Je lia ektiro de la ŝnuro ligita al la sonorilego, la sonorillango frapis la vandon de sonorilego, kaj tuj aŭdiĝis sonoj de frapado tra la tuta loko. Homoj, junaj kaj maljunaj, eliris el diversaj stratetoj kaj kolektiĝis sub ĝi. Ili gapis al li, kiel pupoj. Li pene englutis la maĉaĵon kaj viŝis sian buŝon ĉirkaŭitan de vangoharoj per la maniko. Ĉiuj direktis sian rigardon al lia buŝo, kiu apenaŭ malfermiĝis, aŭdiĝis lia sakraĵo: “Damne! Tiuj fi-hundidoj en la komunuma oficejo rekvizicias jen du tegolistojn unu tagon jen du ĉarpentistojn alian tagon, kaj jam disigis la laborforton de nia vilaĝo. Eta Ŝtonhakisto, ĉar la komunuma oficejo volas plilarĝigi la kontraŭinundan baraĵon malantaŭ la vilaĝo, do unu ŝtonhakisto kaj unu laborhelpanto el po produkta grupo estas postulataj. Pro tio vi devas iri tien.” Li diris al altkreska junulo kun larĝaj ŝultroj.

Eta Ŝtonhakisto havis senĝenan mienon, kun nigraj brovoj kaj blankaj dentoj en forta kontrasto. Li malpeze ekskuis sian kapon, tiel ke tufo da haroj glitinta sur la frunto leĝere svingiĝis supren. Iom balbutante, li demandis al la grupestro, kiu estas la laborhelpanto. Brakumante siajn ŝultrojn, kvazaŭ timante malvarmon, la grupestro, kun okulparo ruliĝanta kiel ventmuelilo, laŭtvoĉe diris: “Estus pli bone sendi virinon tien, sed virinoj devas pluki kotonon. Se sendi viron, tio humiligus lin pro misuzo.” Fine lia rigardo falis ĉe la murangulon, kie staris knabo aĝa je ĉirkaŭ dek jaroj. Tiu, nudpieda kaj nudatorsa, surhavis lozan kaj longan kalsonon kun verdaj strioj sur blanka fono. Sur ĝi kovriĝis pecoj kaj pecoj da malpuraj makuloj, kelkaj el kiuj similis al herba suko kaj aliaj al sekigitaj nazsango. La malsupraj randoj de la kalsono atingis liajn genuojn, super la kruroj punktitaj per briletaj cikatroj malgrandaj.

“Nigra Knaĉjo, ĉu vi bastardo ankoraŭ vivas?” diris la grupestro, rigardante lian elstaran malgrasan bruston, “mi supozis, ke vi jam iris vidi Reĝon de Infero. Ĉu vi jam resaniĝis el malario?”

Tenante sin muta, la knabo nur fiksrigardis la grupestron per siaj nigraj kaj brilaj okuloj. Li havis grandan kapon kaj maldikan kolon, kio donis la impreson, ke la granda kapo ĉiumomente peze derompus la kolon.

“Ĉu vi volas fari ion por gajni kelkajn laborpoentojn? Kion vi, tiom mizeraspekta, povus fari? Oni timas, ke vi estas puŝfaligota eĉ de furzado. Iru kune kun Eta Ŝtonhakisto al la kontraŭinunda baraĵo kiel laborhelpanto. Kion vi diras pri tio? Havigu al vi marteleton ĉe hejmo kaj dispecigu ŝtonojn tie. Se vi emas vigle moviĝi, dispecigu pli da ŝtonoj, sed, se ne, malpli. Laŭ mia sperto, la aferoj asignitaj de la kumunuma oficejo estas nur aĵoj por mistifiki fremdajn diablojn.”

La knabo malrapide moviĝis al la ŝtonhakisto kaj tiris lin je la vestbasko. Amike frapetante lian senharan kalabaso-forman verton, tiu diris: “Hejmeniru kaj petu martelon de via duonpatrino. Mi atendas vin ĉe la pontkapo.”

La knabo forkuris antaŭen, sed sen ajna rapideco. Ambaŭ liaj maldikaj brakoj svingiĝis, kvazaŭ ĉifonfiguro en rizkampo puŝmovata de la vento. Ĉies rigardo sekvis lin. Rigardante lian

nudan dorson, oni vole nevole eksentis froston tra la korpo. Forte kuntirante la subŝtofitan jakon, la grupestro kriis al la knabo: “Post via hejmeniro, petu de via duonpatrino veston por ŝirmi vin. Ba, vi povruleto!”

La knabo malpezpaŝe eniris sian hejmon. En la korto knabeto kun du strioj da nazmukaĵo estis knedanta koton kun pisaĵo, kaŭrante. Vidinte lin reveni, li levis sian platan vizaĝon kaj etendis siajn brakojn, dirante: “Vra…to…braku…”. Nigra Knabo klinis sin kaj levis ruĝetan folion de abrikotarbo. Per ĝi li forviŝis la nazmukaĵon de sia duonfrato kaj frape gluis ĝin sur la muron, kvazaŭ surgluante afiŝon. Eksvinginte la manon al la duonfrato, li ŝteliris en la ĉambron, kaj trovinte fer-tenila martelo kun fendita beko ĉe murangulo, li elglitis. La juna frato ree eligis kriojn al li. Li trovis vergon kaj pentris grandan cirklon ĉirkaŭ sia juna frato, kaj forĵetinte la vergon, li hasteme kuris en la direkto al la malantaŭo de la vilaĝo, kie troviĝis pli malpli granda rivero kun naŭ-arka ŝtonponto super ĝi. Laŭ riverbordo dense borderiĝis plorsalikoj, kies trunkoj jam kovriĝis per ruĝaj vilecaj radikoj pro trempado de somera superakvo. Nun tiuj radikoj sekiĝis post malŝveliĝo de inundo. Folioj de salikarboj jam maljuniĝis. Oranĝkoloraj falintaj folioj lante drivis antaŭen laŭ la riverfluo. Kelkaj anasoj kvakante naĝis ĉe la bordo kaj ŝovis siajn ruĝajn bekojn en akvoherbojn de tempo al tempo, por serĉi ion manĝeblan.

La knabo suprenkuris la digon. Li jam perdis sian spiron kaj lia elstara brusto ondis kvazaŭ kokineto klukus en ĝi.

“Nigra Knaĉjo!” Eta Ŝtonhakisto ĉe la pontkapo laŭtvoĉe vokis al li: “Kuru pli rapide!”

La knabo kvazaŭkure iris antaŭ lin. Ekrigardinte lin, tiu demandis: “Ĉu vi ne sentas vin malvarma?”

La knabo stupore gapis al li. Tiu surhavis drelikajn pantalonon kaj jakon, sub kiu elmontriĝis fajreruĝa sportĉemizo kun okulfrapa kolumo refaldita. La knabo fiksrigardis la kolumon kvazaŭ bulon da fajro.

“Kial vi rigardas min?” Eta Ŝtonhakisto ekpuŝis lian kapon, kiu skuiĝis kiel klaktamburineto de kolportisto. “Ho ve,” li diris, “vi vere fariĝas stulta pro batado de via duonpatrino.”

Fajfante kaj malpeze tamburante lian kapon per sia fingro, Eta Ŝtonhakisto supreniris la naŭ-arkan ponton kune kun li. Ĉar li havis dikajn kaj solidajn fingroartikojn kiel lavbatilojn, la frapado per ili sur lia senhara kapo kaŭzis doloron. La knabo toleris sensone, nur kun buŝo iom paŭtita. La fajfanto, havante tre lertan buŝon, jen rondigis jen malfermis siajn lipojn por produkti alaŭdecan klaran trilon, kiu pafiĝis en nubojn.

Ili transpasis la ponton, supreniris la kontraŭan digon, kaj post duon-lia irado okcidenten, atingis la kontraŭinundan baraĵon. Fakte la baraĵo estis ponto, sed ĝi diferencis de la ponto per tio, ke, kiam oni enŝovas kluztabulojn, ĝi povas bari akvon, kaj kiam oni eltiras kluztabulojn, ĝi povas ellasi superakvon. Sur la malkruta deklivo estis plantita aro da pufaj amorf-arboj[*]. Interne de la digo sterniĝis inundotero kelkdek metrojn larĝa, sur kies fajne mola sablogrundo elkreskis sovaĝaj herboj tuj post malŝveliĝo de superakvo. Kaj ekstere de la digo etendiĝis vasta ebenaĵo, kiu formiĝis pro akumuliĝo de sabla grundo alportata de inundo ĉiujare ellasita, tiel ke la malmoliĝinta nigra tero pliboniĝis kaj la tero fariĝis tre fekunda. Ĉar ĉijara inundo ne estis tiom granda, en minacante la digon, oni ne ellasis inundon per eltirado de kluztabulojn. En la inund-ellasa spaco oni plantis abundon da bangladeŝaj jutoj tiel densaj kiel praarbaro. Tiam estis frumatene kaj kelka maldensaj nebulo ankoraŭ ŝvebis super la jutoj. Vidate el malproksime, la jutplantejo en nebulo similis al profunda maro.

[*] Amorpha fruticosa

Kiam Eta Ŝtonhakisto kaj Nigra Knaĉjo senhasteme suriris la kontraŭinundan baraĵon, sur la sabla tero antaŭ la baraĵo jam kolektiĝis du aroj da homoj, unu por viroj kaj la alia por virinoj, kvazaŭ du kontraŭstarantaj armeoj. Oficisto de la komunumo, kun notlibro en la mano, estis parolanta inter viroj kaj virinoj, jen levante jen mallevante la brakon. Eta Ŝtonhakisto, prenante la manon de Nigra Knaĉjo, laŭ la cementa ŝtuparo ĉe la kapo de la kluzponto, aliris antaŭ la oficiston.

Eta Ŝtonhakisto diris: “Ni alvenas, vicdirektoro Liu.” Ili konatiĝis unu kun la alia, ĉar Eta Ŝtonhakisto ofte afervojaĝis al la kumunuma oficejo kaj vicdirektoro Liu ofte gvidis aron da homfortoj plenumi diversajn projektojn. Nigra Knaĉjo rigardis la larĝan buŝon de la vicdirektoro, kies purpuraj lipoj intertuŝiĝis kaj eligis serion da vortoj: “Denove vi ruzulo, Eta Ŝtonhakisto! Fi al via grupestro, li vere kapablas trovi lertulaĉon. Jen li sendas vin, ruzan friponon, kiun oni ne povas preni eĉ per kaptilo. Jen tio embarasigos min. Kie estas la laborhelpanto?”

La knabo sentis, ke Eta Ŝtonhakisto donis frapeton per sia fingro sur lia kapo.

“Ĉu li povas esti kalkulita kiel plenkreskulo?” La vicdirektoro prenis la kolon de la knabo kaj skuis ĝin kelkfoje, tiel ke la kalkanoj de la knabo preskaŭ leviĝis de la tero. “Ĉu vi povus levi martelon, malgrasa simieto?” li gravmiene demandis al la knabo.

“Sufiĉe, vicdirektoro Liu, Suno Liu. Temas pri avantaĝoj de socialismo, ĉu ne? Ĉiuj rajtas manĝi. La familio de Nigra Knaĉjo havas tri sinsekvajn generaciojn en la statuso de malriĉa kamparano. Kiu alia, krom socialismo, zorgas pri li? Kaj plie, li jam perdis sian propran patrinon kaj vivas kun duonpatrino. Lia patro, diablo scias kial, foriris suden senspure. Oni ne scias, ĉu li estas formanĝita de urso aŭ lupo. Kie estas via klasa simpatio al li?” diris duonfalse kaj duonvere Eta Ŝtonhakisto, forkaptinte la knabon de la vicdirektoro.

La knabo sentis iom da vertiĝo pro ilia puŝado kaj repuŝado. Ĵus kiam li staris proksime al la vicdirektoro, li flaris odoron de alkoholaĵo el lia buŝo. Kiam ajn li flaras tian odoraĉon, li eksentas vomemon. La buŝo de lia duonpatrino elspiras tian odoraĉon. Post kiam lia patro foriris, lia duonpatrino ordonis al li ŝanĝi alkoholaĵon en butiko per sekigitaj batatpecoj. Okaze de ŝia ebrieco, ŝi lin batis, pinĉis kaj mordis.

“Malgrasa simieto!” vicdirektoro Liu sakris al la knabo. Ne plu donante atenton al li, li daŭrigis sian paroladon.

Portante la martelon per mano, la knabo malvigle suriris la baraĵon, kiu mezuriĝis cent metrojn longa kaj dekkelkajn metrojn alta. Norde de ĝi sidis samlonga kvadrata cisterno, en kiu ankoraŭ restis iom da somera pluvakvo. Starante sur la baraĵo kaj mane prenante la ŝtonan balustradon, li rigardis la ŝtonojn sur la fundo de la akvo, kie kelkaj nigraj fiŝoj mallerte naĝis inter ŝtonoj. La du ekstremoj de la baraĵo kunligiĝis kun la alta digo, sur kiu esits ŝoseo kondukanta al la gubernia urbo. La ebena surfaco de la baraĵo larĝis kvin metrojn kaj ĉe ĝiaj ambaŭ flankoj staris po ŝtona balustrado alta je duono da metro. Antaŭ kelkaj jaroj, biciklantoj estis forpuŝitaj de ĉevalĉaro suben de la baraĵo, kaj ili rompis al si la krurojn aŭ talion, eĉ perdis la vivon. Tiam, kompreneble, li estis multe pli juna ol nun, sed multe pli karnoplena ol nun, ĉar lia patro ankoraŭ ne foriris suden nek lia duonpatrino drinkis. Li suprenkuris la baraĵon por rigardi la okazaĵon. Pro lia ioma malfruiĝo, tiuj viktimoj sube de la baraĵo jam estis forportitaj kaj nur restis kelkaj spuroj ruĝaj kaj malklaraj. Kun akra nazo, li flaris la odoraĉon de sango alblovita el la akvo…

Apogante sian manon sur la malvarman ŝtonbalustradon, li frapis ĝin per la martelo. Ambaŭ la martelo kaj balustrado eksonis. Kiam li aŭskultis ilian sonadon, la paseo tuj malaperis el antaŭ

liaj okuloj. La suno brile prilumis la vastaĵon de jutplantoj ekster la baraĵo. Li vidis, ke maldensa nebulo hasteme sin ŝovas tien kaj ĉi tien en la jutkampo. Tre dense staris la juttigoj, kies suba parto ŝajnis iom interspacigita kaj kies supraj folioj kaj branĉetoj interpuŝiĝis malsekaj kaj briletaj. Li direktis sian rigardon plu okcidenten. Tie, okcidente de la jutkampo troviĝis batatkampo kun purpure brilaj folioj. Laŭ lia scio, la batatoj tie plantitaj estas nova specio, kiu karakteriziĝas per mallonga rampa tigo, fruktabundo, granda dolĉa ruĝa enhavo kun pala ŝelo, kaj kiu kreviĝas, bone kuirite. Norde de la batatkampo videblis legomaj kampoj. Pro tio, ke la privataj kampoj de vilaĝoj estis alproprigitaj al la komununa kolektivo, la produktgrupo vole nevole kultivis legomojn en tiuj kampoj. Li sciis, ke tiuj legomkampo kaj batatkampo apartenas al riĉa vilaĝo, kvin liojn malproksima. En la legomkampo kreskis brasikoj kaj ŝajne rafanoj kun prosperaj inknigraj folioj. Meze de tiuj legomkampo staris du solecaj domoj, kie loĝis soleca maljunulo, kion ĉiuj infanoj sciis. Norde kaj okcidente de la legomkampo sterniĝis vasto da jutplantoj. Ĉirkaŭitaj de jutplantoj de tri flankoj kaj la digo de unu flanko, la batatkampo kaj legomkampo formiĝis kiel granda kvadrata putego. En lia kontemplado, tiuj purpurkoloraj kaj verdaj folioj dummomente fariĝis akvo en la puto, ankaŭ jutplantoj fandiĝis en akvon, kaj paseroj flirtantaj super jutplantoj aliiĝis al verdkoloraj alcedoj, kiuj kaptis fiŝojn kaj salikokojn sur la akvosurfaco…

Vicdirektoro Liu ankoraŭ daŭrigis sian paroladon. La ĉefaj punktoj de lia parolado legiĝis jene. Por lerni de Dazhai produktbrigado, oni devas rigardi akvoutiligon kiel vivon kaj bazon de agrikulturo. Akvo estas unu punkto el Ok-punkta Ĉarto de agrikulturo[*]. Sen akvo agrikulturo ŝajnas senpatrina infano, eĉ se la infano havas patrinon, ŝi ne havas mamojn, kaj eĉ se ŝi havas mamojn, tiuj manoj ne donas lakton, kaj pro tio la infano ne povas plu vivi, kaj eĉ se ĝi ĝisvivas, ĝi similas al tiu malgrasa simieto. (La vicdirektoro fingromontris Nigran Knaĉjon starantan sur la baraĵo, kun la dorso al la homamaso. Du cikatregoj sur lia dorso blindige brilis en sunlumo.) Kaj pro tio, ke tiu ĉi baraĵo estas tre mallarĝa kaj danĝera, kaj kaŭzas falmortigon de homoj ĉiujare, la revolucia komitato de la komunumo donas grandan atenton al tio, kaj decidas plilarĝigi ĝin post serioza diskutado, tial sume ĉirkaŭ du cent laborantoj estas alsenditaj el diversaj produktbrigadoj de la tuta komunumo. La tasko de la unua etapo estas, ke junulinoj, edzinigitaj virinoj, maljunulinoj kaj tiu malgrasa simieto (Li denove fingromontris la knabon sur la baraĵo. Sunlumo radiis al liaj cikatregoj kiel al du speguletoj.) disrompos tiunjn ŝtonojn de kvin cent kubmetroj en pecetojn grandajn kiel pilolojn aŭ bulojn de ovoflavo. La ŝtonhakistoj devas bonorde tajli ĉiujn ŝtonmaterialojn laŭ ties dimensioj. Ili du estas niaj forĝistoj (Li fingromontris du brunkolorajn homojn, unu alta kaj maljuna, kaj la alia malalta kaj juna.), kaj ili okupiĝas pri riparado de ŝtalaj borilojn, kiujn ŝtonhakistoj malakrigis pro uzado. Manĝu en sia hejmo, tiuj, kies hejmo estas proksima, kaj manĝu en nia manĝejo en antaŭa vilaĝo, tiuj, kies hejmo estas malproksima. Dormu en sia hejmo, tiuj, kies hejmo estas proksima, kaj dormu en subpontaj kavernoj (Li fingromontris dekojn da kavernoj sub la pontbaraĵo.), tiuj, kies hejmo estas malproksima. Virinoj dormu de oriento al okcidento, dum viroj de okcidento al oriento. En kavernoj sterniĝas tritikpajloj bonaj kiel risortaj litoj, tre komfortaj al vi ĉiuj uloj.

“Ĉu vi ankaŭ dormos en kaverno, vicdirektoro Liu?”

“Mi estas estro. Mi havas biciklon. Estas mia propra afero, ĉu mi dormos ĉi tie aŭ ne. Ne ŝovu vian nazon en fremdan vazon, vi zorgemulaĉo. La oficiro rajtas rajdi ĉevalon, ĉu la soldato ankaŭ? Bone laboru, vi bastardo. Ĉiutage, krom sufiĉe da laborpoentoj, vi ricevas subvencion de

[*] La ĉarto inkludas ok erojn, t.e. teron, sterkon, akvon, semon, densan plantadon, protektado, administradon kaj laborilojn.

duonkilogramon da greno kaj kvinonon da juano por akvoutiliga konstruado. Diablo prenu tiun, kiu ne volas labori ĉi tie. Eĉ malgrasa simieto ricevos sian porcion de subvencio. Mi certas, ke li grasiĝu post finkonstruado de la baraĵo…”

Tiujn vortojn Nigra Knaĉjo ne aŭdis. Li krucigis siajn maldikajn brakojn ĉirkaŭ la ŝtonbalustrado, kun la marteleto inter la manoj. Li aŭskultis birdan muzikon kaj muzikecan ĉirpadon de aŭtunaj insektoj en la jutkampo. Forfuĝanta nebulo frapiĝis kontraŭ malhelruĝaj aŭ helverdaj tigoj, kaŭzante surdigan bruon. Akridoj svingis flugilojn, eligante sonoron kvazaŭ trajno trapasanta sur la fera ponto. En sonĝo, li vidis trajnon, kiu similis al unuokula monstro, kiu kuris pli rapide ol ĉevalo, eĉ en rampa pozo, kiel do se ĝi kurus en stara pozo? En lia sonĝa imago, tuj kiam la trajno ekstaris, li estis vekita de batado de sia duonpatrino per balailo. Ŝi ordonis, ke li ĉerpu akvon ĉe la rivero. Batado per balailo kaŭzis al li neniom da doloro, sed nur varman senton. La sonoj de batado sur la sidvangoj ŝajnis kvazaŭ oni frapus sakon da kotono per klabo en malproksima loko. Li iom volvis ĉirkaŭ la vekton la ŝnurojn kun hoko, tiel ke la siteloj povis pendi iomete super la tersurfaco. Kiam li levportis du sitelojn da akvo per ŝultroj, li aŭdis klakadon de siaj ostoj. Liaj ripoj kline kunfandiĝis kun la gambo. Sur la kruta deklivo de la digo, li ŝanceliĝis, tenante la vekton per ambaŭ manoj. La vojeto kondukanta al la digo zigzagis inter salikarboj. La trunkoj de salikarboj estis ekipitaj kvazaŭ per magnetoj, kiuj altiris la ferladajn sitelojn jen dekstren jen maldekstren. Kunfrapiĝinte kontraŭ arbo, sitelo elversîs akvon sur la vojeton, kiu fariĝis tre glita. Kun piedo sur ĝi, li kvazaŭ surtretis melonŝelon kaj stumble falis surventre sur la teron, en nedifinebla pozo. La akvo elversiĝis kiel akvofaleto, malsekigante lin tra la korpo. Kelkaj gutoj da sango enfluis en lian buŝon. Li elsputis ĝin duone kaj englutis ĝin duone. La ferladaj siteloj ĝoje ruliĝis en la riveron. Levinte sin, li postkuris la sitelojn, unu el kiuj malrekte kuŝis en la akvoherboj de la rivero kaj la alia estis forportita laŭ la fluo. Li antaŭenkuris laŭ la bordo, tretante la sovaĝajn herbojn “hundaj fekaĵbuloj”, nomatajn de li kaj liaj kamaradetoj. Malgraŭ, ke li penis kapti herboradikojn per siaj piedfingroj, li glitis en la riveron, kies varma akvo atingis lian ventron. Malsekigite, lia kalsono elmergiĝis kaj volvis lian talion kiel maso da meduzo. Li plaŭde antaŭeniris kaj kaptis la sitelon, kaj returnis kontraŭ fluo. Disetendante siajn brakojn, li trenis sitelon per unu mano kaj remis frapon post frapo per la alia. La akvo estis tiel repuŝema, ke li iris stumble. Pro tio li arkigis sian korpon kaj penis antaŭeniri kun la kolo streĉita. Ŝajnis al li, ke li estis ĉirkaŭita de fiŝoj, kiuj milde kisadis lin inter liaj femuroj. Li haltis kaj zorgeme maĉis la senton, sed ekhaltinte, li tuj perdis la senton. La akvosurfaco abrupte malheliĝis kaj la fiŝoj ŝajne forfuĝis panike. Kiam li ekiris refoje, la plezuriga sento reaperis kaj la fiŝoj ŝajne alsvarmis. Tiel, li ne plu haltis, kaj kun duonfermitaj okuloj, antaŭeniris, iris…

“Nigra Knaĉjo!”

“Nigra Knaĉjo!”

Li surprizite vekiĝis. Kiam li rondigis siajn okulojn, tiuj fiŝoj tuj malaperis. La marteleto liberiĝis el liaj manoj kaj rekte plonĝis en la verdan akvon sube de la baraĵo, ŝprucigante surfon kiel blankan krizantemon.

“Tiu malgrasa simieto certe havas muŝon en la kapo.” Suno Liu supreniris la baraĵon kaj pinĉis lin je la orelo, laŭte dirante: “Iru tien martele dispecigi ŝtonojn kune kun tiuj maljunulinoj. Provu elekti unu el ili kiel vian adoptan patrinon.”

Eta Ŝtonhakisto aliris. Palpante lian malvarman kapon, li diris: “Do iru elpreni vian marteleton el la akvo. Dispecigu tiom, kiom plaĉas al vi, kaj vin amuzu kiam vi tediĝos de dispecigo.”

“Se vi riskas mallabori per ruzo, mi fortrancas viajn orelojn por mia drinkada kunmanĝaĵo!” Tiuj vortoj eliris el la larĝe malfermita buŝo de Suno Liu.

Nigra Knaĉjo ektremis. Li sin elŝovis tra interspaco de la balustrado, alkroĉigis siajn manojn al la lasta ŝtonstango kaj tuj pendigis sian korpon suben.

“Ĉu vi serĉas la morton!” surprizite kriis Eta Ŝtonhakisto kaj sin klinis por kapti lian manon. Tiu kuntiriĝis malsupren, kaj alpremante sian korpon al la lozanĝ-forma ŝtona elstaraĵo de la blanka piliero, lerte malsupren grimpis, kvazaŭ geko sur kalkita muro. Li sible englitis en la cisternon, elakvigis sian marteleton, elrampis el la cisterno kaj malaperis en pont-kavernon.

“Tiu malgrasa simieto!” Karesante sian mentonon, Suno Liu diris, “Tiu bastarda malgrasa simieto!”

Elŝovinte sin el la pont-kaverno, la knabo retiriĝeme paŝis al la grupo de virinoj, kiuj estis ride sakrantaj per malpuraj vortoj inter si. Kelkaj knabinoj, kiuj miksis sin inter la virinoj, volis sed timis aŭskulti, kaj iliaj vizaĝoj, pro hontemo, ruĝiĝis kiel kokokrestoj. Kiam la knabo subite aperis antaŭ ilin, iliaj buŝoj tute sigeliĝis. Post momenta hezito, kelkaj flustris unuj al aliaj. Vidinte, ke la knabo ne reagas, ili laŭtiĝis sian voĉon iom post iom.

“Jen vidu. Kia mizeruleto! Li estas eĉ senvesta en ĉi tiom malvarma sezono.”

“Vere tiu estas malbone traktata de sia duonpatrino, kiu mem ne naskis lin el sia subtruo.”

“Oni aŭdas, ke lia duonpatrino faras en sia hejmo tian senhontan aferon…”

La knabo sin turnis kaj rigardis la riverakvon, ignorante tiujn virinojn. Sur la riversurfaco riveliĝis ruĝaj kaj verdaj pecoj, kaj salikfolioj flirtis kiel libeloj super la transa suda bordo.

Starante malantaŭ li, junulino kun purpurruĝa kvadrata kaptuko sur la kapo, softe demandis: “Hola, knabo, el kiu vilaĝo vi venas?”

Li iom oblikve ekklinis sian kapon kaj balais la demandantinon per straba ekrigardo. Li vidis, ke super ŝiaj lipoj kovriĝas tavolo da delikataj orflavaj viloj, kaj ŝi aspektas dormeme pro sia densa kaj vila okulhararo.

“Kio estas via nomo, etulo?”

Li estis batalanta kontraŭ maljuna dornorampaĵo: li per piedfingroj deŝiris ses-aŭ-ok-pintaj pikilojn unu post alia kaj dispremis ilin per sia nuda kalkano, sub kiu disrompiĝis la pikiloj kaj frakasiĝis dornoj.

La junulino plezure ekridis: “Vere kapabla vi estas, knabo. Via kalkano ŝajne surportas hufferon. Hej, kial vi ne parolas?” Ŝi ekpuŝis lian ŝultron per du fingroj, dirante: “Ĉu vi aŭdas min? Mi demandas al vi.”

Li sentis, ke ŝiaj du fingroj malsupren glitis de lia ŝultro kaj haltis sur la cikatron sur lia dorso.

“He, kio kaŭzis ĝin?”

Liaj du oreloj ekmoviĝis. Tiam ŝi rimarkis, ke li havas paron da tro grandaj oreloj.

“Viaj oreloj povas moviĝi, ha, kiel tiuj de kuniklo.”

Li sentis, ke ŝia mano transpasis al lia orelo kaj du fingroj karesis lian belan orellobon.

“Diru al mi pri ĉi tiuj cikatroj, Nigra Knaĉjo,” ŝi malpeze tiris lian orelon, tiel ke li turnis sian korpon al ŝi. La knabo altis ĝis ŝia brusto. Ne levante sian kapon, li nur rigardis horizontale. Li vidis tolon kun kvadratoj krucigitaj per ruĝa fadenoj, kaj sur ĝi harplektaĵon kun flaviĝinta pinto. “Ĉu morditaj de hundo aŭ kaŭzitaj pro furunkiĝo aŭ frotvunditaj pro arbogrimpado? Vi estas vere mizera…”

Emociite, li levis sian vizaĝon kaj rigardis ŝian rondan mentonon. Li eksnufis.

“Lekanteto, ĉu vi volas adopti filon?” kriis kontraŭ ŝi junulino kun larĝa kaj grasa vizaĝo.

La knabo turnis siajn okulojn kelkfoje, kaj la okulblanko ŝajne flirtis kiel griza noktopapilio.

“Jes, mi nomiĝas Lekanteto. Mi loĝas en antaŭa vilaĝo, dek liojn fore de ĉi tie. Se vi volas ekparoli, nomu min franjo Lekanteto,” ŝi diris al li.

“Lekanteto, ĉu vi naskas amon al li? Ĉu voli junan edzon? Tio kaŭzos al vi grandan mizeron. Vi devas atendi plurajn jarojn, kiam tiu anasido maturiĝos…”

“Kia fia virino! Kiam vi ekparolas, vi ŝprucas fekaĵon el la buŝo,” ŝi sakris al tiu grasdika virino.

Kondukinte la knabon al monto da ŝtoneroj, ŝi trovis platan ŝtonon kaj bonorde metis ĝin sur la tero, dirante, “Sidiĝu ĉi tie kaj dispecigu senhaste apud mi.” Kaj ŝi trovis glatan ŝtonon, faris al si sidlokon kaj sidiĝis apud li. Baldaŭ aŭdiĝis klaksonoj de dispecigo sur la sabla spaco antaŭ la kontraŭinunda baraĵo. Virinoj, prenante lin kiel temon, ekdiskutis pri tio, kiel malfacile homoj trenadas sian vivon kaj kio estas la kaŭzo de tiu malfacila vivo. En la filozofio de babilemaj virinoj, la eterna vero ĉiam miksiĝas kun sensencaĵoj. La junulino Lekanteto aŭskultis nenion el la babilado. Ŝi tamen atenteme observis la knabon. Komence li respondis al ŝia atentemo per okaza ekrigardo per siaj grandaj okuloj, kaj poste li, kvazaŭ en tranco, gapis kun larĝe rondigitaj okuloj, al oni ne scias kio. Ŝi rigardis lin kun streĉiteco. Li tenis ŝtonpecon per maldekstra mano kaj levadis martelon per la dekstra. Ĉiufoje, kiam li eklevis la martelon, li aspektis elĉerpite, kaj je ekfalo de la martelo, li kvazaŭ ĵetis pezaĵon senregeble. Kelkfoje, pro tio, la junulino preskaŭ konsternite ekkriis, sed nenio okazis. La martelo sekvis zigzagan orbiton en la aero kaj ĉiam falis sur la ŝtonpecon.

Lia rigardo fiksiĝis sur la ŝtono, sed, kiam li aŭdis strangan delikatan sonon el la rivero, jen proksime jen malproksime, kvazaŭ tiun de fiŝoj ensorbantaj akvon, li penis kapti ĝin per oreloj kaj okuloj. Li vidis la brilantan vaporon spiralantan supren el la rivero, la vaporon, en kiu kasiĝis la sono. Se li nur rigardis la mirindan vaporon, la bela sono ne povis forfuĝi. Iom post iom lia vizaĝo ruĝiĝis kaj al liaj buŝanguloj naĝis rideto. Li jam delonge forgesis, kie li sidis kaj kion li faris, kvazaŭ levado kaj mallevado de lia mano apartenus al tiu de aliulo. Post kelka tempo, li ekkonsciis pri sensenteco de la dikfingro de sia dekstra mano, kaj lia dekstra brako aŭtomate ekspasmiĝis. Subite li eligis silabon similan al vekrio aŭ suspiro. Mallevinte la kapon por rigardi, li trovis, ke la ungo jam disrompiĝis en kelkajn pecojn kaj sangstrioj eksudis el ungofendetoj.

“Ĉu vi jam martelis vian manon, Nigra Knaĉjo?” La junulino tuj stariĝis, alpaŝegis kaj kaŭriĝis ĉe li. “Ho, ĉielo! Kian fuŝaĵon vi faris per martelo! Ĉu aliaj faras kiel vi? Via korpo estas ĉi tie, sed via koro jam vagas en alia lando.”

Ŝi senĉese riproĉis lin, sed tiu tuj alpremis per sia dekstra mano manplenon da grundo sur la disrompitan fingron.

“Ĉu vi freneziĝas, Nigra Knaĉjo? En grundo troviĝas ĉiaj malpuraĵoj!” Ŝi tiris lin en la direkto al la rivero, akompanate de lia laŭta paŝbruo kun plandoj tretantaj sur la oleeca tero. Kaŭriĝinte ĉe bordo, ŝi kaptis lian manon kaj trempis ĝin en akvon. Post kiam la loesa grundo estis forlavita, sangstrio denove perlis kaj tremis kiel ruĝa fadeno en la akvo, kaj lia ungo similis al frakasitaj jadpecoj.

“Ĉu tio doloras vin?”

Li tenas sin senparola. Tiam li fiksis sian rigardon salikokon ĉe la riverfundo, kies korpo estis tute travidebla kaj kies du antenoj lante flirtis elegante.

Ŝi elpoŝigis poŝtukon kun brodita rozfloro kaj vindis per ĝi lian manon. Tirante lin je la mano,

ŝi reiris al la ŝtonamaso kaj diris al li: “Nu, sidiĝu kaj vin amuzu. Neniu zorgas pri vi, senpripensemuleto.”

Haltigante marteladon, virinoj aldirektis sian malsekan rigardon. Momente regis silento ĉe la ŝtonamaso. Aro post aro da ŝaf-formaj nuboj galopis tra la heleblua ĉielo kaj forlasis efemerajn masojn da malluma ombro, kiu de tempo al tempo vualis palan riversablejon kaj senhelpan riverakvon. Tristeco ekaperis sur la vizaĝoj de la virinoj, kiel aridaj sal-alkalaj terpecoj. Post longa momento, ili, vekiĝinte kvazaŭ el sonĝo, rekomencis frakasi ŝtonojn, eligante sporadajn kaj monotonajn frapsonojn, kio elspiris la sentimenton de senhelpeco.

Sidante en silento, la knabo fiksrigardis la ruĝan floron sur la poŝtuko. Apud la floro aperis alia floro, kiu formiĝis per la sango elfluanta el lia ungo. Tre baldaŭ la virinoj forgesis lin kaj kukue ridsone babilis. Levinte sian vunditan manon al la buŝo, li ŝirmalligis la nodon de la poŝtuko per dentoj kaj denove alpremis plenmanon da grundo sur la vunditan fingron per la dekstra mano. Tuj antaŭ ol ekparoli, la junulino trovis, ke li jam bone nodigis la poŝtukon per dentoj kaj dekstra mano. Eliginte longan suspiron, ŝi levis martelon kaj peze faligis ĝin sur malmolan brunruĝan ŝtonpecon kun klingeca rando, kiu, frapite de martelo, eligis grandajn fajrerojn videblajn eĉ dum taglumo.

Tagmeze, vicdirektoro Liu, rajdante sur nigra biciklo, elgalopis el la vilaĝo de Nigra Knaĉjo kaj Eta Ŝtonhakisto. Starante sur la baraĵo, li blovis fajfilon por ĉesigi laboron, kaj poste li anoncis, ke la komuna manĝejo jam funkcias kaj tiuj laboristoj, kies hejmo estas kvin liojn for, rajtas havi manĝon tie. Oni hasteme kolektis siajn ilojn. La junulino kaj la knabo stariĝis.

“Kiom malproksime via hejmo staras, Nigra Knaĉjo?”

Ignorante ŝin, la knabo turnadis sian kapon, kvazaŭ serĉante ion. Ankaŭ ŝi turnadis la kapon samdirekte kun lia kapo. Kiam lia kapo ĉesis turniĝi, ŝi haltigis la sian. Rigardante antaŭen, ŝi trovis, ke lia rigardo rendvuis kun tiu de Eta Ŝtonhakisto dum kelkdek sekundoj.

Eta Ŝtonhakisto diris: “Nigra Knaĉjo, ni iru hejmen preni manĝon. Ne vane gapu. Niaj hejmoj malproksimas ne pli ol du lioj. Ni ne rajtas ĝui manĝon en la komuna manĝejon.”

“Ĉu vi ambaŭ devenas de la sama vilaĝo?” ŝi demandis al Eta Ŝtonhakisto.

Tiu fariĝis balbutema pro ĝojego. Montrante la vilaĝon, li diris, ke li kaj la knabo estas samvilaĝanoj kaj ili atingas la hejmon post transpaso de la ponto. Ŝi kaj li interŝanĝis kelkajn ordinarajn sed intimajn vortojn. Li eksciis, ke, ĉar ŝia hejmo situas en la antaŭa vilaĝo, ŝi rajtas utiligi la komunan manĝejon kaj dormi en pontkaverno. Tamen ŝi diris, ke ŝi volontas manĝi tie, sed ne dormi en pontkaverno, ĉar ventas aŭtune kaj la pontkaverno malvarmas. Plie ŝi sekrete demandis al li, ĉu la knabo estas mutulo. La ŝtonhakisto respondis, ke li certe ne estas mutulo, sed sagaculo. Kiam li estis kvar-aŭ-kvin-jara, li parolis multe kaj flue, sed poste liaj vortoj pli kaj pli malmultiĝis, kaj plejofte eĉ stuporiĝis kiel ŝtonstatueto. Neniu sciis, kion li pripensas. Rigardu lian okulparon, profundan kaj nesondeblan. La junulino diris, ke ŝi povas eltrovi en li sagacecon, kaj scias, kial ŝi ŝatas lin kiel sian bonan frateton. La ŝtonhakisto respondis, ke tia sento estiĝas pro sia bonkoreco.

Senkonscie la trio postlasiĝis la plej malantaŭe. Li kaj ŝi interparolis tre varme. Li eĉ volus, ke ili iru unu paŝon kaj retroiru du paŝojn. Sekvante ilin, la knabo alte levis siajn piedojn kaj malpeze faligis ilin, impresante per aspekto kaj irmaniero de virkateto, kiu patrolis laŭ murrando. Sur la naŭ-arka ponto, Suno Liu, kiu ĵus restis iom da tempo en amorf-arbaro, kuratingis knare rajdante sur biciklo. Pro mallarĝeco de la ponto, li vole nevole malsuprensaltis de la biciklo.

“Kial vi tiel malrapidas ĉi tie? Kiel bone vi faris hodiaŭ antaŭtagmeze, Nigra Knaĉjo? Kio

okazis al via ungaĉo?”

“Martelo falrompis lian manon.”

“Malbenite! Eta Ŝtonhakisto, iru al via grupestro tuj hodiaŭ tagmeze kaj volu, ke li anstataŭigu lin per alia homo pli frue. Se morto okazos, mi ne povos preni respondecon.”

“Li vundiĝis por komuna afero. Ĉu vi estas tiel malmolkora lin forpeli?” laŭte diris la junulino.

“Vicdirektoro Liu, ni ambaŭ havas multjaran amikecon. Ĉu vi opinias, ke tiu knabo estas balasto sur tiel granda konstruejo? Kion li povos fari kun nemovebla mano, kiam li revenos al sia vilaĝo?” diris Eta Ŝtonhakisto.

“Vi malgrasa simieto, fik!” diris enpenseme la vicdirektoro, “mi lasu vin fari alian laboron. Tiri blovilon por forĝisto, ĉu bone? Ĉu vi povas fari tion?”

La knabo direktis peteman rigardon al Eta Ŝtonhakisto kaj la junulino.

“Vi povas fari tion, ĉu ne?” diris Eta Ŝtonhakisto.

La junulino kuraĝige balancis la kapon al li.

## II.

La kvinan tagon, de kiam la knabo eklaboris ĉe forĝejo, lia nuda korpo jam fariĝis brile nigra kiel peco da bonkvalita karbo. De kapo ĝis piedoj nur pale glimis liaj dentoj kaj okulblankoj. Pro tio lia okulparo des pli sin montri kortuŝa. Kiam li, kunpremante siajn lipojn, rigardis iun, tiu eksentis korpremon kvazaŭ bruligite de brulstampilo. Ĉe ambaŭ aloj de lia nazo kaj ankaŭ inter liaj haroj longaj duoncolon plene troviĝis karbpolvo. Nun, ĉiuj, viraj kaj virinaj sur la konstruejo, nomis lin Nigra Knaĉjo. Li donis atenton al neniu, eĉ ne ĵetante alvizaĝan ekrigardon. Nur kiam Lekanteto kaj Eta Ŝtonhakisto alparolis al li, li respondis per siaj okuloj. Hieraŭ tagmeze, kiam ĉiuj foriris preni manĝon, ĉe forĝista majstro estis forŝtelitaj marteleto kaj nova tino por enteni akvon de hardado. Pro tio Suno Liu sakradis duonhoron sur la baraĵo. Li asignis al Nigra Knaĉjo novan taskon, ke tiu gardu ilojn ĉe la konstruejo ĉe la tempo, kiam oni finas la laboron por preni tagmanĝon, kaj ke la forĝista majstro alportu al li tagmanĝon. Li diris, ke li malavare provizas senpagan tagmanĝon al tiu malbenita Nigra Knaĉjo.

Ĉiuj foriris, kaj tomba silento ekregis en la konstruejo post antaŭtagmeza bruado. Elirinte el la pontkaverno, Nigra Knaĉjo malrapide paŝadis tien kaj tien sur la sablejo antaŭ la baraĵo. Kun siaj manoj malantaŭ la dorso premantaj la sidvangojn, li kuntiris la brovojn tiel firme, ke sur lia frunto aperis tri profundaj sulkoj. Li ripetade nombris la pontarkaĵojn, pufe elblovante salivbobelojn inter la lipoj. Ĉe la sepa piliero, li haltis. Alpremante per ambaŭ kruroj la lozanĝ-forman randon de la piliero, li surprengrimpis pli kaj pli, elstarigante kaj retirante la ŝultrojn. Meze de grimpado, li falglitis, kun granda frotvundo sur la ventro. Li sin klinis, levis plenmanon da grundo kaj alpremis ĝin sur la ventron. Poste retroirinte kelkajn paŝojn, li metis sian manon super la okuloj kaj rigardis la fendon inter piliero kaj pontsurfaco, kun spiro de malŝarĝiĝo.

Post nelonge li reiris al la loko, kie virinoj estis frakasintaj ŝtonojn. La ŝtono, sur kiu li jam sidis, malaperis. Li precize trovis la sidlokon de Lekanteto, ĉar li konis ŝian ses-eĝan marteleton por ŝtonhakisto. Sidiĝinte sur ŝia sidloko, li senĉese tordis sian korpon kaj pozis diversmaniere, ĝis li alĝustigis sian rigardon al la ŝtonfendon ĉe la sepa piliero. Tiam li sidis senmove, fiksrigardante la aĵon en la fendo…

Tiun tagmezon li plifrue kuris al la unua pontkaverno de okcidento kaj kaŭriĝis en ĝi. Liaj okuloj karesis foje-refoje fornegon, feran tenajlon, martelegon, marteleton, ladan tinon, karboŝovelilon, eĉ ĉiun karbopecon kaj ĉiun skorion. Proksime al la labora horo, preninte karboŝovelilon per la dekstra mano, li disŝovis la premfermitan fajron en la fornego, kaj forte ektiris la blovilon per la maldekstra. Tio kaŭzis disflugadon de fumo kaj karbopolvo. Kaj pro tio liaj okuloj ne povis malfemiĝi kaj li forte frotis ilin ĝis kongestiĝo purpura en okulkavoj. Ĉar la blovilo estis peza pro nove-remburitaj kokplumoj, li sentis iom da fortostreĉeco en tirado de ĝia piŝtostango. Kiam lia dekstra montrofingro estis tuŝita, li ĵetis ekrigardon al ĝi, kio memorigis lin pri la poŝtuko bandaĝanta lian vunditan fingron. La poŝtuko estis jam ne plu pura kaj blanka, sed la rozfloro brodita sur ĝi ankoraŭ restis freŝe ruĝa. Ideo venis en lian kapon. Li eliris kaj ĉirkaŭrigardis. Ĉe la sepa piliero, malliginte la poŝtukon kaj tenante ĝin per la buŝo, li pene suprengrimpis kaj enŝovis ĝin en la ŝtonfendon…

Pro lia fuŝado en la fornego per kelkfoja pikado kaj ŝovado, la fajro estingiĝis. Sur lia frunto perlis ŝvito. Tiam aŭdiĝis peza paŝbruo. Li konsternite retropaŝis ĝis lia dorso algluiĝis al la malvarma rokmuro. Li vidis, ke envenas mallongakrura junulo kun kurbigita dorso, kvazaŭ li volus pruvi per tia pozo, ke la pontkaverno estis malalta, dum li altkreska. La knabo ekpaŭtis. La mallongakrurulo, jen ekrigardinte la estingiĝintan fornegon kaj duone eltiritan piŝtostangon de la blovilo jen la knabon alpremiĝantan al la rokmuro, sakris: “Vi hundido! Kion vi fuŝas ĉi tie? La fajro estingiĝis pro via fuŝado kaj la blovilo malrekte lokiĝas. Vi friponeto indas je batado!” La knabo aŭdis siblon de vento super sia kapo kaj sentis frapadon de kruda manplato sur sia verto, kaj tuj poste aŭdiĝis klara kraksono, kvazaŭ rano ĵetiĝus ĝismorte sur la tero.

“Elruliĝu de ĉi tie kaj dispecigu ŝtonojn, vi bastardo!” sakris la junulo.

La knabo eksciis, ke li estas la juna forĝisto. Ties vizaĝo kovriĝis per aknoj kaj ties nazo, plena je ŝviteroj, estis plata kiel tiu de bovido. La knabo vidis, ke, lerte ordiginte la fajrujon, la juna forĝisto ekprenis faskon da orflavaj pajloj, ŝovis ĝin en la fajrujon, bruligis ĝin kaj malpeze tiradis la blovilon kelkfoje, kaj ke maldensa kaj blanka fumo eliĝas el la pajloj kaj tuj sin ĵetas flamoj. La juna forĝisto ŝovelis malsekajn karberojn kaj disŝutis ilin maldike sur la brulantaj pajloj, dum li ne ĉesis tiradi la blovilon. Duafoja kaj triafoja disŝutadoj de karberoj. El la fornego sin pafis brunflava fumo kun nazpika odoraĉo de karbo. La juna forĝisto pikis per la pinto de la ŝovelilo la karbon en la fornego, kaj kelkaj fortaj kaj malhelruĝaj flamoj elfulmis — karbo ekbruliĝis.

Ekscitite la knabo eligis “ho”.

“Ĉu ne tuj elruliĝu vi friponeto!”

Maldika kaj altkreska maljunulo malrapide eniris la pontkavernon kaj demandis al la juna forĝisto: “Ĉu ni jam premferme konservis la fajron? Kial vi faras fajron duan fojon?”

“La fajro estas fuŝe estingita de tiu friponeto.” Tiu montris la knabon, iom levinte la ŝovelilon.

“Lasu lin tiradi la blovilon,” diris la maljunulo. Li ĉirkaŭligis ovflavan oletolon ĉirkaŭ la talio kaj du pecojn da ovflava oletolo ĉirkaŭ piedradikoj por protekti pied-dorsojn. Sur la oletolo estis punktitaj per truetoj, de kio la knabo eksciis, ke li estas maljuna forĝisto.

“Lasu lin tiri la blovilon kaj vi nur faru marteladon, tiel ke via laboro estas iom pli facila.”

“Ĉu lasu tiun flavbekulon tiri la blovilon? Jen vidu, kiom malgrasa li estas. Li estos bakita ĉe la fornego en velkintan skeleton, ĉu ne?” murmuris malkontente la juna forĝisto.

Suno Liu enpaŝis abrupte. Kun palpebroj levitaj, li diris: “Kion vi diris? Ĉu vi ne petis de mi

blovil-tiranton?”

“Jes, sed ne lin! Vicdirektoro Liu, vidu, kiel osteca li estas! Mi timas, ke li bastardo eĉ ne kapablas levi la ŝovelilon. Por kio vi sendas lin al ni? Li estas nur senutilaĵo por nia laboro!”

“Mi scias, kion vi kovas en via verto. Ĉu vi volas junulinon por tio? Ĉu mi sendu la plej belan junulinon surportantan purpurruĝan kvadratan kaptukon? Jen belan imagon havas vi hontema hundido! Nigra Knaĉjo, tiru la blovilon.” Li kontraŭdiris al la juna forĝisto: “Bone instruu lin, vi malbenito!”

La knabo retiriĝeme iris al la blovilo kaj haltis. Kvazaŭ esperante ion, li rigardis en la vizaĝon de la maljuna forĝisto. Li trovis, ke la vizaĝkoloro de la maljunulo brunas kiel tiu de trobakitaj tritikgrajnoj, kaj ties nazpinto ŝajnas tromatura kratagbero. Tiu aliris kaj instruis al la knabo, kiel ardigi fajron. Kun tremantaj oreloj, la knabo ensorbis ĉion, kion la maljunulo diris.

Ĉe la komenco, kiam li ektiris la blovilon, li agis mallerte, plene kovrate de ŝvito. La flamoj bakis lian haŭton, tiel ke li sentis doloron kvazaŭ kaŭzitan de pikado de pingloj. La maljuna forĝisto elmontris nenian vizaĝesprimon, rigidan kiel tegolo, eĉ ne ĵetante ekrigardon al li. Mordante sian malsupran lipon, la knabo senĉese levis sian nigran brakon por forviŝi ŝviton fluantan super la okuloj. Lia kava brusto ondadis, kaj liaj buŝo kaj nazo, kiel la blovilo, brue faris elspirojn.

Kiam Eta Ŝtonhakisto sendis malakrigitajn ŝtalajn borilojn por riparado, li rigardis la aspekton de la knabo kaj alparolis: “Ĉu vi povas stari kontraŭ tio? Se vi ne, eldiru kaj reiru dispecigi ŝtonojn.”

La knabo eĉ ne levis sian kapon.

“Vi obstinemulo!” Ĵetinte tiujn eluzitajn borilojn sur la teron, la ŝtonhakisto foriris. Tamen li tre baldaŭ revenis, kune kun la junulino Lekanteto, kiu elmontris sian plenan vizaĝon, surportante la kvadratan kaptukon ĉirkaŭ la kolo.

En la kaverno la juna forĝisto sentis ekfulmon antaŭ siaj okuloj. Li pene glutis salivon kaj lekis seke krevintajn lipojn per sia grasdika lango. Liaj okuloj ne estis malgrandaj ol tiuj de Nigra Knaĉjo, sed en lia dekstra okulo rafanflor-forma makulo, helverda kiel ŝelo de anasovo, kovris la pupilon. Pro longatempa rigardado per maldekstra okulo, li formis la kutimon klini sian kapon dekstren. Kun la kapo restanta sur la dekstra ŝultro, li direktis ardan rigardon de maldekstra okulo rekte al la ruĝaj vangoj de la junulino. La kapo de dekok-funta fera martelgo sidis inter liaj piedoj, kaj li permane tenis ĝian tenilon kvazaŭ apogante sin je lambastono.

El la fornego leviĝis fumo kaj fajro. La nigra fumo kun fajreroj ĵetiĝis rekte al la ponta surfaco kaj indigne repuŝiĝis suben. Envolvate en fuma nebulo, la knabo tusis kaj eligis siblon el la brusto. Ĵetinte malvarman ekrigardon al la knabo, la maljuna forĝisto elprenis tabakujon el brile frotita ledsako, plenigis la pipon malrapide kaj bruligis ĝin super la fornofajro. Li elspiris du kolonetojn da blanka fumo en la nigran fumon. Du tufoj da nigraj haretoj tremetis en lia nazo. Ĵetinte tra la fumnebulo senemocian ekrigardon al Eta Ŝtonhakisto kaj Lekanteto ĉe la kaverna aperturo, li diris al la knabo: “Aldonu karbon malmulte kaj ŝutu ĝin iom egale maldike.”

La kanbo hasteme tiradis la blovilon kun malgrasa korpeto klinante antaŭen kaj malantaŭen. La fornofajro prilumis lian ŝvitmalsekigitan bruston kaj ĉiuj liaj ripoj klare videblis. Inter la ripoj de maldekstra brustparto lia koro kompatinde batadis, saltante kiel museto. La maljuna forĝisto ordonis: “Tiru iom longe. Fuŝu neniun tiradon.”

Kiam Lekanteto vidis skarlatan sangon fluantan el la buŝo de la knabo, larmoj tuj svarmis al ŝiaj okuloj. Ŝi kriis: “Nigra Knaĉjo, ne laboru por ili. Iru dispecigi ŝtonojn kune kun mi.” Alirinte

al la blovilo, ŝi kaptis liajn du maldikajn ostecajn brakojn. Pene baraktante, li eligis murmuradon el la gorĝo kiel mordpreta hundido. Pro malpezeco de lia korpo, la junulino facile eltrenis lin el la kaverno, levtenante liajn brakojn. Liaj krudaj piedfingroj skrapis la terplankon, ke la ŝtoneroj sur la planko grincis.

“Nigra Knaĉjo, ne laboru por ili. Vi ne povas elteni fumon kaj bakadon. Pro via malgraseco, se via ŝvito elĉerpiĝos, vi estos bakita kiel riza krusto. Estas facile dispecigi ŝtonojn kune kun mi.” Dirante, ŝi mallevis lin kaj trenis lin per unu mano al la ŝtonamaso. Kun fortikaj kaj dikaj brakoj kaj larĝaj kaj suplaj manoj, ŝi tenis lian manradikon kiel kruron de kaprido. Li penis retiri sin, plugante knare ŝtonerojn sur la tero.

“Malsaĝuleto, obstinuleto, obeeme sekvu min,” haltiginte siajn paŝojn, ŝi returnis la kapon kaj diris, forte tenante lian manradikon, “jen vidu vian etan kruraĉon. Se mi streĉus forton, certe mi knede disrompus ĝin. Kiel vi povus fari tiom pezan laboron?” Malice ekrigardinte ŝin, li subite mallevis la kapon kaj forte ekmordis ŝian grasan pojnon. Kun vekrio “Aj!”, ŝi malstreĉis sian tenadon, kaj la knabo sin turnis kaj rekuris en la kavernon.

Per akraj dentoj, li forlasis du profundajn vicojn da dentspuroj sur ŝia pojno. Liaj du dentoj, kiel boriloj, boris sur ŝia pojno du truetojn kun sango fluanta. Alirinte zorgeme al ŝi, Eta Ŝtonhakisto elpoŝigis ĉifitan poŝtukon kaj volis bandaĝi por ŝi. Ŝi forpuŝis lin sen ekrigardi lin, kaj klininte sian korpon, ŝi kaptis manplenon da grundo kaj alpremis ĝin sur la vundon.

“Vin gardu kontraŭ bakterioj!” surprizite ekkriis Eta Ŝtonhakisto.

Reirinte al la malorda ŝtonamaso, ŝi sidiĝis sur sian sidlokon. Gapante stupore al la senĉesa ondado de la rivero, ŝi ne dispecigis eĉ unu ŝtonon.

“Vidu! Aperas plia stultulo.”

“Plejeble Nigra Knaĉjo povas influi ŝin per sorĉo.”

Virinoj flustris unu al la alia.

“Nigra Knaĉjo, eliru, vi hundidaĉo! Vi maldankeme mordis bonfaranton,” sakrante, Eta Ŝtonhakisto iris al la pontkaverno, kie troviĝis la forĝista laborejo.

Malpura kaj varma akvo elverŝiĝis eksteren kaj malsekigis lin de kapo ĝis piedoj. Duontino da akvo tute trafis lin sen guto malŝparita. Sur lia mola flaveta hararo, jako el dreliko kaj la refaldita kolumo de la ruĝa sportvesto plene makuliĝis per ferpecetoj kaj karbopolvo, kaj la malpura akvo gutadis de lia kapo ĝis liaj piedoj.

“Vi blinda fihundo!” sakrante, li sin pafis en la kavernnon, “Kiu faris tion? Eldiru, kiu fari tion.”

Neniu donis atenton al li. En la kaverno nigra fumo forvelkis kaj la fornofajro ardiĝis. La maljuna forĝisto kun kupra haŭto elprenis per longa tenajlo el la fornego brile inkandeskan borilon, sur kies pinto krake eksplodis blindigaj ŝtalaj sparkoj. Li metis la borilon sur la feran amboson kaj ekmartelis la randon de la amboso, kiu tuj klare sonis responde al li. Per sia maldekstra mano li manipulis la longan tenajlon kun la borilo, kiu turniĝis laŭ lia volo, kaj per la dekstra li rapide marteladis la amboson. Kien lia marteleto bate gvidis, tien la unuokula juna forĝisto batadis per la ok-funta martelego. Kiel bekanta koko la marteleto de la maljunulo rapidis, kaj la martelego de la junulo ne volis esti iom malrapida, el kio sentiĝis varma vento. En animskua forĝado la borilo ŝprucigis ĉiuflanken fajrerojn, kiuj sin pafis sur la oletolon de antaŭtukoj kaj piedvestoj de la maljunulo kaj junulo, siblante per blanka fumo. Fajreroj ankaŭ flugis al la senkovritan haŭton de la knabo kaj li lipgrimacis, montrante du vicojn da purblankaj lupdentoj. Fajreroj brulvundis lian ventron per kelkaj grandaj haŭtvezikoj, sed li elmontris nenian vizaĝesprimon spite al doloro. En

liaj okuloj saltis ekstazaj flamoj. Li levis ambaŭ ostecajn ŝultrojn kaj forte enŝovis sian kolon. Kun krucigitaj brakoj sur la brusto, li firme kovris la mentonon kaj buŝon per siaj manoj, tiel ke lia nazo multe sulkiĝis.

La malakra borilo estis pintigita per martelado kaj ĝia koloro malheliĝis de nigra ruĝo al arĝenta blanko. Sur la tero elŝutiĝis tavolo da grizblankaj ferpecetoj, kiuj bruligis herb-tigon. La herbo eligis senzorgeme leviĝantan blankan fumon.

“Kiu diable verŝis akvon sur min?” Eta Ŝtonhakisto sakris kontraŭ la juna forĝisto.

“Jen mi faris tion. Kion vi volas do?” respondis la forĝisto kun ŝvitbrila korpo, tenante la stangon de martelego kaj elegante oblikvigante la kolon.

“Ĉu vi estas blinda?”

“Mia unu okulo estas blinda. Mi elverŝis akvon, dum vi iris vian vojon. Ĝi hazarde trafis vin. Vi ja havas bonŝancon.”

“Ĉu vi tiel pravigas vin?”

“En nuna tempo tiu, kiu havas pli grandan pugnon, havas pravigon.” La juna forĝisto kunpremis pugnon. La muskolo de lia brako ŝveliĝis.

“Venu, vi unuokululo! Hodiaŭ mi volas bateblindigi vian alian okulon.” Eta Ŝtonhakisto kolere alpaŝis, kaj la maljuna forĝisto ŝajne senintence faris paŝon antaŭen kaj ekkunpuŝiĝis kun li. La ŝtonhakisto subite konsciis, ke ia materio ĵetiĝas el la profundaj kaj kavigitaj okuloj de la oldulo, ŝajne sugestante ion, kaj li tuj sentis muskolojn tra la korpo malstreĉiĝi. La oldulo iom levis sian vizaĝon kaj laŭplaĉe zumkantis versojn, kiujn oni ne povis distingi la guston de ia opero aŭ kanto

*Mi sopiras al vi juna heroo lertanta en ĉevalbatalo kaj verkado de poemoj,*

*mi vojaĝis kun vi en mond’ spertante subĉielan vivon kaj milmiloj da mizeroj.*

Nur post kantado de tiuj versoj, li tuj haltigis sian voĉon. El lia kantado oni povis juĝi, ke li englutis tiujn tristajn sonojn fine de versoj en sian ventron. Li ĵetis alian ekrigardon al la ŝtonhakisto, kaj, mallevinte la kapon, hardis la ĵus pintigitan borilon en akvon. Antaŭ ol fari tion, li suprentiris la manikon de la dekstra brako kaj trempis sian manon por provi la akvan varmon. Sur lia antaŭbrako videblis malhele purpura cikatro, ronda kaj elstara en la mezo. Kvankam ĝi ne similis al okulo, la ŝtonhakisto sentis, ke ĝi rigardis lin, kvazaŭ stranga okulo. Ekpaŭtante, li flirte eliris el la kaverno, menskonfuzite kvazaŭ sorĉite. La tutan posttagmezon ne videblis plu lia ombro ĉe la fornego.

… La okuloj de la knabo acidiĝis kaj lia kaphaŭto arde varmiĝis. Stariĝinte el la sidloko de la junulino, li paŝis ĉe la fornegon. En la malhela kaverno, li palpe sidiĝis sur la faldeblan tabureton de la maljuna forĝisto. Kiam li pensis pri nenio, liaj manoj brule doloris. Kaj li tuj alpremis siajn manojn al la malvarma rokmuro, direktante sian menson al pasintaj okazaĵoj.

Antaŭ tri tagoj, la maljuna forĝisto petis forpermeson hejmeniri por preni vatitan veston kaj litkovrilon, dirante, ke li ne volas hejmeniri ĉiutage, ĉar la piedoj de maljunulo estas valoraj, kaj ke li ne sentos malvarmon tranoktante, se li aranĝos dormejon ĉe la fornego. (La knabo levis siajn okulojn por rigardi lian dormejon. La norda flanko de la pontkaverno jam estis ŝtopita per kluztabuloj. Kelkaj lumstrioj filtriĝis tra tabulfendoj kaj oblikve sin ĵetis sur la olebrilan vatitan veston kaj la harfaliĝintan hundfelan littukon de la maljuna forĝisto.) Post kiam la maljuna majstro reiris hejmen, la juna forĝisto fariĝis la reĝo de la kaverno. Tiun antaŭtagmezon, li, kun elstarigitaj brusto kaj ventro, eniris la kavernon kaj bonhumore diris: “Nigra Knaĉjo, faru fajron. La maljunulaĉo jam foriris. Ni ambaŭ laboru senĝene.”

La knabo rigardis lin.

“Kial vi gapas al mi, vi leporido! Vi malestimas min, ĉu? Mi jam elteneme pasigis tutajn tri jarojn sub la maljunulaĉo. Mi konas ĉion, kion li posedas,” diris la juna forĝisto.

La knabo malvigle faris fajron. La juna forĝisto fiere zumis ian kanton tra la nazo. Li enŝovis en la fajrantan fornventron la borilojn, kiuj ankoraŭ ne estis ripritaj en la pasinta tago. Tirante la blovilon, la knabo multe ardigis la fajron, kiu elbakis ruĝan koloron el lia nigreta vizaĝo. Subite la juna forĝisto ekridis, dirante: “Nigra Knaĉjo, ne estas problemo, se vi pretendas esti ruĝarmea soldato per cikatroj tra via tuta korpo!”

La knabo energie tiradis la blovilon por ardigi fajron.

“Kial mi ne vidas, ke via koketa adopta patrino vizitas vin? Vi jam ofendis ŝin per ekmordo al ŝi, vi hundido. Kian guston ŝia brako havas? Acidan aŭ dolĉan? Vi hundido ja havas bonŝancon por gustumi ŝin. Se mi sukcesus akiri ŝian blankan delikatan brakon, mi forronĝus ĝin kiel kukumon.”

Per longa tenajlo la knabo tenis ruĝvarmegan ŝtalan borilon kaj ĵetis ĝin sur la amboson.

“Ho, filĉjo, kiel facilmova!” Preninte mezgrandan martelon, la juna forĝisto tenis tenajlon per unu mano kaj svingis martelon per la alia, kaj komencis forte marteli. Li, kiu havis grandan forton, lerte svingis la martelon. La pinto de la borilo, kiun li martele riparis, elmontris klarajn eĝojn, kvazaŭ akrigitan krajonon. Prenante la bone preparitan borilon per tenajlo, li hardis ĝin en akvotino, sammaniere kiel la maljuna forĝisto. La knabo deturnis sian vizaĝon por rigardi la gvidmarteleton kuŝantan ĉe la amboso, la gvidmarteleto, kies ligna tenilo estis tiel brila kaj glata kiel la korno de maljuna bovo.

Rapidmove kiel bona kuranta ĉevalo, la juna forĝisto finriparis dekkelkajn borilojn dum mallonga tempo. Sidante sur la fadebla tabureto de la majstro, li fiermiene rulis cigaredon, kaj ŝovis rulitan cigaredon ĉe la buŝangulon. Li ordonis al la knabo preni ardantan karbopecon por bruligi ĝin.

“Ĉu vi jam vidis, filĉjo? Sen tiu maljunulaĉo ni same faris bone!”

Kiam la juna forĝisto montris sian fierecon, la ŝtonhakistoj, kiuj ĵus forprenis la ŝtalajn borilojn, venis al li por plendoj.

“Kiel diable vi hardis ilin, juna forĝisto? Ili aŭ rompis aŭ kurbigis sian pinton. Ni ja hakas ŝtonojn per ili, sed ne tranĉas toŭfuon. Faru laŭ via kapablo! Atendu ĝis via majstro revenos. Ne ekzercu vin en martelado per niaj boriloj!”

Ĵetinte tiujn eluzitajn borilojn sur la teron, ili foriris. Ŝanĝinte sian vizaĝan koloron, la juna forĝisto krie ordonis al la knabo ardigi fajron por varmigi borilojn. Dum kelka tempo, ili denove bone riparis kaj hardis borilojn, kaj portis ilin al la konstruejo. Sed apenaŭ ili eniris la kaveron, tiuj ŝtonhakistoj postsekvis. Ili ĵetis borilojn sur la teron kaj malpurajn vortojn sur la kapon de la juna forĝisto. “Diablo vin prenu! Ne mistifiku nin! Vidu, kiel vi hardis ilin! Ili ĉiuj malbenite rompis sian pinton!”

Ekrigardinte la knabon, la juna forĝisto vidigis du sulketojn ĉe la buŝanguloj, el kio oni ne sciis, ĉu li estas gaja aŭ afliktita. Pum, pum, pum! Li ĵetis la ilojn de forĝisto sur la teron, kaj kaŭrinte, li elblovis subpremitajn spirojn. Fumante cigaredon, li rulis sian solan okulon, de kie ĵetiĝis nebuleca kaj eksplodema lumo sub du ranid-formaj brovoj rapide tordiĝantaj. Forĵetinte cigaredstumpon, li stariĝis, dirante: “Mil diabloj! Mi ne kredas, ke forĝisto ne povas elfari bonan feraĵon! Nigra Knaĉjo, faru fajron kaj ni daŭrigu!”

La knabo malvigle tiradis la blovilon, pli kaj pli malrapide. La juna forĝisto sakre urĝis lin,

sed li eĉ ne levetis sian kapon. Denove la boriloj estis pretigitaj en fajro por forĝado. Post kelkfoja malzorgema martelado, la juna forĝisto hasteme prenis ilin al la tino por hardado. Ĉifoje li ŝanĝis sian manieron: li ne tiel hardis borilon iom post iom kiel la maljuna forĝisto, sed trempis ĝin tute en akvon. La akvo en tino sibladis kaj blanka vaporo spirale sin pafis supren. Li levis ĝin, alproksimigis ĝin antaŭ siajn okulojn, kaj kun oblikve klinita kapo, pririgardis ĝiajn aspekton kaj koloron. Post kelka tempo, li metis la borilon sur la amboson. Li frapetis ĝin per martelo kaj ĝi disrompiĝis en du pecojn. Deprimite, li ĵetis la martelon sur la teron, kaj du pecojn de la borilo eksteren de la kaverno. La difektita borilo kuŝis sur ŝtonpeco antaŭ la kaverno, donante malĝojigan impreson.

“Iru preni tiun borilon kaj revenu!” la juna forĝisto kolere ordonis al la knabo. Tiu ekmovis sian orelon, sed ne movis siajn piedojn. Lia pugo estis piedbatita kaj lia ŝultro puŝegita per tenajlo. Aŭdiĝis tondra krio: “Iru preni la borilon kaj revenu!”

Kun pendanta kapo, la knabo iris al la borilo, iom post iom klinis sian talion kaj kaptis ĝin. Li aŭdis sibladon en la mano, kvazaŭ mantenante cikadon, kaj flaris odoron de fritita porkaĵo. La borilo peze falis sur la teron.

La juna forĝisto ŝtoniĝis kaj tuj eksplodis per ridego. “Vi leporido, mi jam forgesis, ke la borilo estas varmega. Ronĝu viajn bone kuiritajn porkpiedojn!”

Reveninte en la pontkavernon, la knabo ĵetis neniun ekrigardon al la juna forĝisto. Post kiam li trempis en la tino siajn brogitan manon dum momento, li malrapide eliris el la kaverno. Li sin klinis kaj zorgeme pririgardis la duonpecon de la borilo. Ĝi havis arĝentblankan kaj krudan surfacon kun multaj grajnoj. La malseka grundo sub ĝi vaporiĝis blanke, jen videble jen nevideble. Li klinis sin pli malalten, ke lia pugo leviĝis alten kaj la kalsono tute retiriĝis al la pugo, rivelante la femurojn malpli malhelkolorajn ol la kruroj. Kun unu mano premanta sur la dorso, li pendigis la alian de antaŭ la ŝultro kaj proksimigis ĝin al la borilo. Akvero gutis el lia fingropinto, tiel ke la ŝtala borilo eligis sibladon. La akvero sur la borilo saltetis, siblis, malgrandiĝis, fariĝis ondcirklo, kiu unue grandiĝis, tuj kuntiriĝis, kaj fine malaperis. Lia fingropinto jam sentis ĝian brulan varmegon, kiu rekte konduktis al lia koro.

“Kion diable vi faras tie? Ĉu vi volas pretendas esti denuncata en publika kunveno kiel aŭtoritatulaĉo kun kapitalista ideologio, kun klinita talio kaj levita pugo?” vokis al li la juna forĝisto en la kaverno.

La knabo kaptis la borilon, tremante, kaj forte mantenante la pugon, senhaste reiris. Vidante flavan fumon eliĝanta el lia mano, la juna forĝisto, kun paralizulecaj okuloj, histerie kriis: “For…forĵetu ĝin!” Kun ŝanĝiĝita tono, li katsimile kriis: “Forĵetu ĝin, vi friponeto!”

Kaŭriĝinte antaŭ la juna forĝisto, li malstreĉis tenadon de la mano kaj skuis ĝin dufoje, tiel ke la borilo faris du ruladojn kaj kuŝiĝis ĉe la piedo de la juna forĝisto. Poste ankoraŭ kaŭrante, li kapleve rigardis al la vizaĝo de la juna forĝisto.

Tiu ektremis trakorpe: “Ne rigardu al mi, vi hundidaĉo, ne rigardu al mi.” Li deturnis sian vizaĝon. Stariĝinte, la knabo eliris el la kaverno… Li memoris, ke, elirinte el la kaverno, li fiksis sian rigardon al la okcidenta ĉielo dum kelka tempo, sur kiu troviĝis neniu nubero kaj nur videblis blanka kaj maldika duonluno similanta al malgranda nubero…

Li pensadis ĝis laciĝo, kun abeleca zumado ĉe orelo. Stariĝinte el la faldebla tabureto de la maljuna forĝisto, li iris al lia dormejo kaj sin kuŝigis. La kapo apogiĝis sur la vatita vesto kaj la okuloj nevole fermiĝis. Li sentis, ke iu karesis liajn vizaĝon kaj manon. Tio dolorigis lin kaj li eltenis. Du pezaj larmgutoj falis, unu inter liaj lipoj, kiujn li englutis, kaj la alia sur lia nazpinto,

kaŭzanta acidan senton.

“Nigra Knaĉjo, Nigra Knaĉjo, vekiĝu. Tempo por manĝi.”

Sentante sin tre acida en la nazo, li hasteme leviĝis kaj rigardis al la junulino. Li forte retenis du larmofluetojn el siaj okulkavoj kaj fine sukcesis lasi larmon flui en la gorĝon.

“Jen prenu ilin.” La junulino malligis purpurruĝan kaptukon, en kiu troviĝis du vaporkuiritaj panoj, unu enŝovita per peklita kukumo kaj la alia per ĉina cepo. Haro kun flaviĝinta pinto algluiĝis al la pano. Per du fingroj la junulino pinĉis la haron kaj malpeze fingropafis ĝin. La knabo aŭdis ĝian laŭtan sonon falantan sur la teron.

“Manĝu, vi hundeto!” diris la junulino, karesante lian kolon.

Maĉante kukumon, cepon kaj panon, li rigardis ŝin.

“Kiel via mano estis brule vundita? Ĉu la unuokululo faris malbonon al vi? Ĉu vi ankoraŭ volas mordi min? Jen vidu, kiel akraj viaj hundodentoj estas!”

Kun moviĝantaj oreloj, li ŝirmis la vizaĝon per ambaŭ manoj, la maldekstra tenanta vaporumitan pano kaj la dekstra ĉinan cepon kaj peklitan kukumon.

# III.

Nokte tondropluvis senkaŭze. Frumatene, kiam laboro komenciĝis, oni vidis, ke la ŝtonpecoj en la konstruejo estas pure lavitaj kaj la sabla tero ebenigita pro pluva frapado. La akvo en la kanalo sub la baraĵo altiĝis je du spanoj kaj sporadaj griznuboj respeguliĝis sur la blua akvosurfaco. La vetero ŝajne tuje malvarmiĝis. La aŭtuna vento blovanta tra la pontkaverno, kunportante susuradon de marsimila jutkampo, sentigis fridecon ĝis la koro. La maljuna forĝisto surportis la brile ŝelecan vatitan veston, kies ĉiuj butonoj estis jam falintaj, kaj pro tio li vole nevole kunmetis du klapojn de la vesto kaj ligis ilin ĉe la talio per ruĝa kaŭĉuka drato. Dume la knabo surhavis nur kalsonon kun nudaj torso kaj piedoj, sed li elmontris neniom da trememo. La tola rubando, kiun li antaŭe zonis ĉe la talio, estis forĵetita aŭ kaŝita, kaj anstataŭe li zonis la talion ankaŭ per ruĝa kaŭĉuka drato. Dum ĉi tiuj tagoj liaj haroj freneze kreskis, jam ĉirkaŭ unu colon longaj, kaj hirtiĝis kiel pikiloj de erinaco. Vidante lin nudpiede treti akvoflaketojn sur ŝtonoj tra la konstruejo, laborantoj esprimis kompaton kaj admiron.

“Ĉu vi sentas malvarmon aŭ ne?” mallaŭte demandis la maljuna forĝisto.

La knabo konsternite rigardis la demandinton, kvazaŭ li tute ne komprenus, kion li demandis. “Mi demandas al vi! Ĉu malvarme?” la maljuna forĝisto plilaŭtigis sian voĉon. Konsterniteco malaperis el la okuloj de la knabo. Kun kapo mallevita, li komencis fari fajron. Li malpeze tiradis la blovilon per maldekstra mano, kaj tenis karboŝovelilon per la dekstra, rigardante brulantajn pajlojn. La maljuna forĝisto prenis olemakulitan veston el sia pajla dormejo kaj surmetis ĝin sur la knabon. Tiu tordis sian korpon, impresante, ke li sentis malkomfortecon. Tuj kiam la maljunulo foriris, li demetis la veston kaj metis ĝin sur la dormejon. Ekskuinte la kapon, la maljunulo kaŭriĝis kaj ekfumis.

“Nigra Knaĉjo, vi povas varmigi vin ĉe la fornego, jen kial vi neniel volas forlasi la forĝistan kavernon. Diablo prenu vin. Vi hometo havas ruzemon,” diris la juna forĝisto, eliginte enuan oscedon.

Sur la konstruejo aŭdiĝis fajfsono. Vicdirektoro Liu alvokis ĉiujn por kolektiĝi. Laborantoj

amasiĝis ĉe la alsuna loko antaŭ la baraĵo. Viroj brakumis siajn ŝultrojn kaj virinoj kudris tolŝuajn plandumojn. Kun malkvieta koro, la knabo kaŝe rigardis al la ŝtonfendo sur la sepa piliero. Vicdirektoro Liu diris, ke pro proksimiĝanta malvarma vetero, oni devas labori plian tempon por plenumi la taskon, ke antaŭ glaciiĝo oni devas finverŝi la fundan kanalon per betono, kaj ke de hodiaŭ ĉiutaga sepa ĝis la deka estas tempo por ekstra laboro kaj pro tio oni ricevos kvaronkilogramon da greno kaj kvinono da juano. Neniu elmetis malsaman opinion. Sur pli ol du cent vizaĝoj videblis diversaj esprimoj. La knabo vidis, ke la pala vizaĝo de Eta Ŝtonhakisto fariĝis ruĝa ĝis purpura, kaj la ruĝa vizaĝo de la junulino griza ĝis pala.

En la sama nokto lumis tri gaslampoj sur la konstruejo de la kontraŭinunda baraĵo. Ili eligis inkandeskan blindigan lumon. Unu el ili prilumis la laborejon de ŝtonhakistoj kaj la alia la lokon, kie virinoj dispecigis ŝtonojn. Pro tio, ke plimulto de virinoj havis infanojn kaj hejmaferojn por zorgi, ili do rezignis pri kvaronkilogramo da greno kaj kvinono da juano. Sub la lampo restis dekkelkaj junulinoj. Pro tio, ke ili malproksimis de sia hejmo, ili riskis kunpuŝiĝe dormi en pontkaverno, kies du ekstremoj estis ŝtopitaj per kluztabuloj kaj ĉe kies fronta flanko restis unu truo por ilia el- kaj eniro. La junulino Lekanteto kelkfoje dormis enkaverne, kelkfoje envilaĝe (Ĉar en la vilaĝo loĝis ŝia patrinflanka kuzino, kies edzo laboris kiel portempa dungito en la gubernia urbo, kelktempe kiam li ne hejmeniris dormi, ŝia kuzino invitis ŝin al la hejmo kiel kompaninon.). La tria gaslampo estis starigita en forĝista pontkaverno, prilumante la maljunulon, junulon kaj knabon. Sur la laborejo de ŝtonhakisto aŭdiĝis ding-dong sonoj. Ŝtalaj boriloj ĉirkaŭronĝis ŝtonojn, eligante ruĝajn fajrerojn de tempo al tempo. Ŝtonhakistoj pli malpli pene laboris. Eta Ŝtonhakisto demetis sian jakon, elmontrante brilruĝan sportveston, kiu ŝajnis brulanta torĉo. Junulinoj sidis ĉirkaŭ la lampo, vagante en multaj belaj pensoj. Kelktempe ili eksplodis per ridego kaj kelktempe sekrete flustris unu al alia, dum la sonoj de frapado sur ŝtonoj aŭdiĝis sporade. Inter tiuj sonoj pleniĝis flubruo de la rivero. Demetinte la martelon, Lekanteto kaŝe stariĝis kaj sin direktis al la rivero. “Vin gardu kontraŭ fraŭlaĉo, kiu vin forkaptos!” alia junulino avertis malantaŭ ŝi. Lekanteto rapide eliris el la lumrondo de la lampo. Tiam en ŝiaj okuloj la lamplumo ŝajnis brile blankaj globetoj kun pikiloj, kies pintoj estis ruĝaj kaj molaj, kaj etendiĝis al ŝi kaj haltis tuj antaŭ ŝi. Poste ŝi antaŭeniris renkonte al la lamplumo. Ŝi subite volis vidi, kion la knabo faras, kaj evitante la lamplumon, ŝi rapidis en la malluman ombron de la unua piliero.

Ŝi vidis, ke la knabo elfe agas. En brilega lamplumo, lia nuda korpo ŝajnis ŝimirita per glazuro, kvazaŭ lia haŭto estus brune farbita kaŭĉuko, elasta kaj martelebleca, nedisŝirebla kaj netrapikebla. Li ŝajne aspektis iom pli graseta, tiel ke liaj ripoj kaj haŭto iom deiĝis. Nemirinde, ĉar ŝi alportis bonan manĝaĵon al li ĉiun tagmezon. Li malofte hejmeniris por manĝo, sed nur por dormado. Kelktempe li eĉ ne hejmeniris. Iun matenon, ŝi trovis, ke li elŝovis sin el la kaverno, kun la kapo algluita per pajleroj. Nun li ambaŭmane tiradis la blovilon facile kaj senpene, kvazaŭ ne estus li, kiu tiradis la blovilon, sed la blovilo, kiu tiradis lin. Lia korpo sin klinis antaŭen aŭ malantaŭen, kaj lia kapo drivis kiel akvomelono en malrapida riverfluo. Du brilaj makuloj en liaj okuloj glisis supren aŭ malsupren kiel lampiroj delikate flugis.

Ĉe la amboso la juna forĝisto staris kun kutima pozo: ambaŭmane li tenis la martelan tenilon kaj gapis kun oblikve klinita kapo, kiel profunde enpensema kokido.

La maljuna forĝisto pertenajle elprenis el la fornego grandan bone varmigitan ŝtalan borilon kaj la knabo ŝovis eluzitan borilon tien, kie la granda borilo estis kuŝinta. La bone varmigita borilo arde blankis kun verdeco. Metinte ĝin sur la amboson, la maljuna forĝisto batis la ambosorandon per gvidmarteleto, kaj la juna forĝisto malvigle levis martelegon, kiel juttigon. La martelego peze

falis sur la borilon kaj fajreroj tuj blindige ŝpruciĝis ĉiudirekten. La ŝtalaj ŝpruĉajoj sin ĵetis kontraŭ rokmuroj, disrompiĝis en pli da malgrandaj fajreroj, kaj falis teren, kaj kiam ili sin ĵetis sur la iom elstaran ventron de la knabo, ili malforte resaltis, bele duonronde tranĉis la aeron kaj plonĝis. Dum flugado de fajreroj post resaltado disde la ventro de la knabo, ili frotis la aeron, eligante sibladon kaj varmon. Post la unua ekbato per martelo, la juna forĝisto, kvazaŭ vekiĝinte el sonĝo, strečis siajn muskolojn kaj plirapidigis sian agadon. La junulino vidis strangan silueton salti sur la rokmuro kaj aŭdis laŭtajn sonojn de kunfrapiĝo de ferpecoj. La juna forĝisto havis tre lertan teknikon formigi ferpecojn, dum la maljuna forĝisto nur ludis la rolon de gvidado per marteleto per la dekstra mano, frapante la ambosorandon. La juna forĝisto bone sciis, kien li devas bati sur la ŝtala borilo. La maljuna forĝisto turnadis la ŝtalan borilon. Tuj kiam liaj okuloj kaj pensoj direktiĝis al la loko, kiu bezonis forĝadon, la martelego de la juna forĝisto jam peze falis sur ĝin, eĉ pli rapide ol li pensis.

La junulino mirigite aprecis la bonan metiarton de la juna forĝisto, kaj samtempe ne forgesis direkti sian rigardon al la maljuna forĝisto kaj la knabo. La momento, kiam la juna forĝisto ludis sian bravuron, estis la momento, dum kiu la knabo elmontris sian plej grandan stuporon (Li fermis siajn okulojn kaj spiregis samtakte kun la blovilo.), kaj la momento, kiam la maljuna forĝisto sentis sin plej trista, ĉar la juna forĝisto kvazaŭ batis lian dignon anstataŭ la borilon.

Post kiam la borilo estis forĝita al postulata formo, la maljuna forĝisto turnis sin por fari hardadon. Li ĵetis signifoplenan rigardon al la juna forĝisto, farante malestiman buŝgrimacon. Tiu fikse rigardis, kiel li faris. La junulino vidis, ke la maljuna forĝisto etendis sian manon en la tinon por provi la akvan varmon kaj levis la borilon por pririgardi, kaj poste kun korpo kurbigita kiel salikoko, fiksrigardante la akvon, li malpeze kaj esploreme tuŝis la akvosurfaco per la borila pinto. La akvo siblis en la tino kaj maldensa nubo da vaporo supren sinĵetis, kiu vualis lian ruĝan nazon. Post momento, li levis la borilon antaŭ siajn okulojn kaj zorgeme fiksrigardis la borilpinton, kvazaŭ ĝi portus belan bildon. Sur lia vizaĝo brilo radiis kaj ĉiu sulketo sur ĝi plenis je ĝojo. Li ekbalancis la kapo kvazaŭ li ricevus kontentigan respondon, kaj trempis la tutan borilon en la akvon. Je tio la vaporo abrupte leviĝis, formante malgrandan fungoforman nubon en la kaverno. La gaslampo fariĝis skarlata, kaj ĉio skuiĝis nebulece. Kiam la vaporo tute forvelkis, restariĝis trankvilo en la kaverno: la knabo ankoraŭ daŭre tiradis la blovilon, la juna forĝisto ankoraŭ meditis kiel kokido, kaj la maljuna forĝisto ankoraŭ aspektis same, kun bruna vizaĝo, pečnigraj okuloj kaj blatformaj cikatroj sur la brako.

La maljuna forĝisto elprenis alian borilon kaj faris la saman procezon. Tuj antaŭ ol li hardis ĝin, io okazis. Li etendis sian manon por provi la akvan temperaturon kaj aldonis malvarman akvon. Tiam li sin montris kontenta. Ĝuste kiam li volis hardi la borilon, la juna forĝisto eksaltis al la tino kaj tre rapide etendis sian manon en ĝin. Senpripense la maljuna forĝisto pikis per la borilo sur la brakon de la junulo. Odoraĉo de bruligita haŭto flugis el la kaverno kaj penetris en la nazon de la junulino.

Kun ekkriego “aj”, la juna forĝisto rektigis sian korpon kaj malice ridis kontraŭ la maljuna forĝisto, laŭtvoče kriis: “Majstro, jam tri jarojn!”

Tiu ĵetis la borilon en la tinon. Akvo en ĝi tuj bole kirliĝis, eligante vaporon, kiu refoje plenigis la pontkavernon. La junulino ne povis klare vidi iliajn vizaĝojn, sed nur aŭdis la maljunan forĝiston diri en nebulo: “Memoru tion!”

Antaŭ ol la vaporo tute disiĝis, ŝi forkuris. Ŝi firme kovris sian buŝon per la mano, ĉar tiam amara gusto ondis en ŝia stomako. Kiam ŝi sidiĝis če la ŝtonamaso, apuda junulino petole

demandis al ŝi: “Lekanteto, ĉu vi enŝovis vin kun junulo en jutkampon?” Ŝi ne respondis, lasante ŝin moki. Ŝi forte pinĉis sian gorĝon per du fingroj por ne eligi la voĉon.

Sonis la fajfo por fini laboron. Dum tri horoj la junulino dronis kvazaŭ en sonĝo.

“Ĉu vi sopiras al viro, Lekanteto?”

“Foriru, Lekanteto.”

Oni diris al ŝi, sed ŝi sidis senmove, rigardante malklarajn homfigurojn en lamplumo.

“Lekanteto,” diris Eta Ŝtonhakisto, starante rekte malantaŭ ŝi, “via kuzino informis per mi, ke vi akompanu ŝin ĉinokte. Ĉu ni iru kune?”

“Iri? Kiun vi alparolas?”

“Kio okazas al vi? Ĉu vi malsaniĝas pro frosto?”

“Kiu malsaniĝas pro frosto?”

“Jen vi!”

“Ne parolu pri mi.”

“Ĉu ni iru?”

“Jes.”

Sub la ŝtonponto la rivero fluis klarsone. Ŝi haltis. Eta Ŝtonhakisto distancis de ŝi nur unu paŝon. Turninte sian kapon, ŝi vidis, ke en la unua pontkaverno okcidente de la kontraŭinunda baraĵo la lampo brile lumis, dum du aliaj gaslampo jam estingiĝis. Ŝi iris direkte al la konstruejo de kontraŭinunda baraĵo.

“Por serĉi Nigran Knaĉjon?”

“Por vidi lin.”

“Ni iru kune. Tiu friponeto, ne falu de la ponto menskonfuzite.”

La junulino sentis, ke li estis tre proksime de ŝi. Ŝajnis, ke ŝi jam aŭdis liajn korbatojn. Dum marŝado, ŝia kapo sin ekklinis kaj tuj tuŝis lian masivan ŝultron. Kaj je kliniĝo malantaŭen de ŝia korpo, fortika brako brakumis ŝin. Li kovris per manego ŝian mamon grandan kiel vaporumitan panon kaj ĝin karesis, kaj ŝia koro bategis sub la mamo kiel blinde fluganta kolombo. Ili paŝis pluen al la subo de kontraŭinunda baraĵo. Antaŭ ol ili eniris en lampluman rondon, ŝi deprenis lian manon de sia brusto, kaj li kompreneme malstreĉis sian brakumon.

“Nigra Knaĉjo!” ŝi vokis.

“Nigra Knaĉjo!” ankaŭ li vokis.

La juna forĝisto, kun la vango ekkramfita, rigardis lin kaj ŝin per unu okulo. Sidante sur la pajla lito, la maljuna forĝisto ambaŭmane tenis la pipon kiel pistolon. Post kelktempa okulmezurado al Lekanteto skarlate vestitan kaj Eta Ŝtonhakisto helflave vestitan, li lace kaj bonkore diris: “Sidiĝu kaj atendu. Li baldaŭ revenos.”

… La knabo, kun malplena sitelo en la mano, supreniris laŭ la digo de la rivero. Post laborhoro, la juna forĝisto oscedante diris: “Mi morte malsatas. Nigra Knaĉjo, prenu la sitelon kaj iru norden elfosi kelkajn batatojn kaj eltiri kelkajn rafanojn. Ni preparos vespermanĝon.”

La knabo elĵetis dormeman rigardon al la maljuna forĝisto, kiu, sidante sur la pajla lito, ŝajnis malvenkita koko kun taŭzitaj plumoj.

“Kion vi rigardas? Vi hundidaĉo, iru laŭ mia ordono,” diris la juna forĝisto kun rektigita korpo, jen kaj jen streĉante sian kolon. Li okule balais la majstron sidantan sur la lito. La brulvundo sur lia brako tre doloris, sed la plezura sento sur lia mano supervenkis tian doloron, absolute komforte kaj absolute bone.

Preninte malplenan sitelon, la knabo trenis siajn paŝojn eksteren. Elirinte el la pontkaverno, li

ŝajne sentis, ke li plaŭde falis en puton. Ĉirkaŭe tiel mallumis, ke en liaj okuloj fulme flagris malklara brilo de tempo al tempo. Li timeme kaŭriĝis kaj tenis siajn okulojn fermitaj dum kelka tempo. Kiam li malfermis la okulojn, la ĉielo paliĝis kaj steloj verŝis varman lumon sur lin kaj la grizbluan teron…

Sur la digo la branĉoj de amorf-arboj interplektiĝis. Dismetante la brancojn per unu mano, li supreniris kun flankenturnita ŝultro. Lia mano trabalais malsekajn branĉojn kaj grapolojn de plenaj arbsemoj ĉe la pintoj de la branĉoj, kaj odoro kun ioma acerbeco atakis rekte en lian vizaĝon. Subite lia piedo ektuŝis ion molan kaj varman kaj aŭdiĝis ekpepado el sub lia piedo. Antaŭ ol li havis tempo por pensi, koturno ekflugis konfuzite kaj falis kiel nigra ŝtonpeco en la jutkampon ekster la digo. Kun bedaŭro li palpis la neston, kie la birdo kuŝis. Tie estis seke kaj troviĝis tufo da sekaj herboj, sur kiuj restis ĝia korpa varmo. Starante sur la digo, li aŭdis la vokojn de la junulino kaj Eta Ŝtonhakisto. Li donis ekfrapon al lada sitelo kaj ili ĉesis voki. Tiam li aŭdis antaŭan riveron klare flui kaj tristan kriĉadon de strigo sur arbo en la vilaĝo. Lia duonpatrino timis kaj tondradon kaj kriĉadon de strigo. Li esperis, ke ĉiutage tondras kaj ĉiunokte strigo kriĉas ĉe la fenestro de lia duonpatrino. La rosoj sur la branĉoj malsekigis lian brakon kaj li frotis ĝin sur la kalsono. Laŭ la vojeto li malsupreniris de la digo. Tiam liaj okuloj jam adaptiĝis al mallumo kaj li povis klare vidi, eĉ diferencigi la delikatajn nuancojn de kafkolora grundo kaj purpuraj folioj de batatoj. Kaŭriĝinte sur la kampo, li disŝovis rampantajn foliojn, deŝiris batatojn, kaj peze ĵetis ilin en la sitelon. Post lia kelktempa disŝirado, io falis el lia fingro kaj susure battremigis batatfolion. Palpinte maldekstran manon per la dekstra, li eksciis, ke la tuta ungo antaŭe disrompita defalis. Norden li iris portante la pezan sitelon. En la kampo de rafanoj, li eltiris ses rafanojn unu post alia, kaj deŝirinte iliajn foliojn, ĵetis ilin en la sitelon…

“Kien vi irigis Nigran Knaĉjon?” Eta Ŝtonhakisto demandis al la juna forĝisto.

“Kial vi maltrankviliĝas? Li ne estas via propra filo, ĉu?” tiu respondis.

“Kie Nigra Knaĉjo?” demandis la junulino, fiksrigardante la solan okulon de la juna forĝisto.

“Atendu. Li iris deŝiri batatojn. Ne foriru kaj atendu por manĝi bakitajn batatojn,” tiu mildvoĉe diris.

“Ĉu vi devigas lin ŝteli?”

“Kio estas ŝteli? Tio ne estas ŝteli, se oni ne portas ilin al sia hejmo!” sinkulpige respondis la juna forĝisto.

“Kial vi ne iris deŝiri?”

“Mi estas lia majstro.”

“Sensencaĵo!”

“Do diru laŭ via plaĉo!” Kun ekbrilo de siaj okuloj, la juna forĝisto sakris al la ekstero de la kaverno: “Nigra Knaĉjo, mil diabloj! Kie vi deŝiras batatojn? Ĉu vi jam iris al Albanio?”

Kun oblikve mallevita ŝultro, la knabo, tenante la anson de la sitelo per ambaŭ manoj, ŝanceliĝe eniris la kavernon. Li estis plene makulita per kotaĵo trakorpe, kvazaŭ rulinte sin sur la tero.

“Ho, mia filo, vi estas vere avida. Mi volis, ke vi deŝiru kelkajn, dum vi alportas sitelplenon!” laŭtvoĉe grumblis la juna forĝisto kontraŭ la knabo, kaj ordonis: “Iru lavpurigi la rafanojn en la cisterno.”

“Lasu do. Ne irigu lin.” La junulino diris: “Vi ardigu fajron por baki batatojn, kaj mi lavpurigu rafanojn.”

La juna forĝisto sidigis batatojn ronde ĉirkaŭ la fajro, kaj facilmove tiradis la blovilon.

Lekanteto reportis rafanojn kaj metis ilin sur puran ŝtonon. Malgranda rafano malsuprenruliĝis kaj, algluiĝinte plene per ferpecetoj, haltis ĉe la piedo de la juna forĝisto. Li klinis sian korpon kaj levprenis ĝin.

"Donu ĝin al mi. Mi lavpurigu ĝin refoje."

"Lasu do. Nur tiuj grandaj rafanoj sufiĉas por nia konsumado," dirante, li laŭvole metis ĝin sur la amboson.

Irinte al la blovilo, la knabo volis transpreni de la juna forĝisto la tirstangon. Ĵetinte ekrigardon al la junulino, la juna forĝisto diris al la knabo: "Iom ripozigu vin, vi hundidaĉo. Ĉu vi sentas vian manon tikla por fari ion? Bone, prenu ĝin. Ne plendu kontraŭ mi. Tiru malrapide. Ju pli malrapide, des pli bone, alie la batatoj estos brule bakitaj."

Eta Ŝtonhakisto kaj Lekanteto sidis ŝultro ĉe ŝultro antaŭ okcidenta rokmuro de la pontkaverno. La juna forĝisto sidis malantaŭ la knabo. Kaj la maljuna forĝisto sidis sur la norda lito, kun vizaĝo al la sudo. La tabako en lia pipopelveto jam cindriĝis, sed li ankoraŭ tenis la pipon per ambaŭ manoj, kun ambaŭ kubutoj apogitaj sur la genuoj.

Jam profundiĝis la nokto. La knabo milde tiradis la blovilon, el kiu iris la elblovetoj kiel beba ronkado. El la rivero alblovis la flubruo, des pli klara. Ŝajnis, ke ĝi aŭdeblas kaj videblas, ne nur kun formo sed ankaŭ kun koloro. Sur inund-tero aktivis malklaraj ombroj, kvazaŭ bestetoj petole ludis, kies delikataj ungetoj tretis sur fajna sablo, eligante klaran mallaŭtan sonon. Maldikaj kaj longaj arĝentfadenetoj trapenetris la klaran riveran muzikon kaj etendiĝis ĉi tien. En la jutkampo norde de la kontraŭinunda baraĵo aŭdiĝis br-br-sonoj, kaj juttigoj kunfrapiĝis, skuiĝis kaj post longa momento rekvietiĝis. Sur la tuta konstruejo restis nur ĉi tiu gaslampo. La flugantaj insektoj, kiuj komence serĉis lumon ĉirkaŭ tiuj du lampoj, post mallongatempa blinda flugado, ĉiuj kolektiĝis ĉe la forĝista fornego kaj vete sin ĵetis al la lumo, klake frapiĝante kontraŭ la vitra kovrilo de la gaslampo. La juna forĝisto iris al la lampo kaj pumpis aeron en ĝin per pumpostangeto. Abrupte talpogrilo enŝoviĝis tra la truon de la lampa kovrilo, kaj faligis arde inkandeskan asbestan kovrilon, tiel ke ekregis mallumo en la kaverno. Nur post kelka tempo unu povis klare vidi alies vizaĝon. La flamoj, kiujn la knabo elblovis per la blovilo, treme flagris kiel ruĝaj suplaj tolpecoj el silko, kaj la kavernon saturis la bonodoro de bone kuiritaj batatoj. La juna foriĝisto per tenajlo turnis la batatojn unu post alia, tiel ke la bonodoro pli densiĝis. Fine ili enmanigis batatojn kaj ruĝajn rafanojn, kaj ekmanĝis. Senŝeligitaj batatoj elspiris blankan vaporon. Ili manĝis buŝplenon post buŝplenon kun gusto, rapide aŭ malrapide, ĝis ilia nazo ŝvitis. Dume la maljuna forĝisto manĝis nenion, sidante tie kiel ŝtona statuo.

"Ĉu vi hejmeniros, Nigra Knaĉjo?" ĉuis la junulino.

Li elŝovis sian langon kaj forlekis la pecetojn de batato sur la lipoj, kun pufiĝinta ventro.

"Ĉu via duonpatrino lasas la pordon neŝlosita por vi?" La juna forĝisto diris: "Ĉu vi enŝovos vin en pajlamason por dormi?"

Ektusinte, la knabo ĵetis pecon da batata ŝelo en fajron kaj tiradis kelkfoje la blovilon. La batata ŝelo kuntiriĝis, ekbrulis kaj plenigis la kavernon per malbonodoro de bruligo.

"Kion vi bruligas, vi bastardo?" La juna forĝisto diris: "Ne hejmeniru. Mi akceptas vin kiel mian adoptan filon. Kaj vi estas ambaŭ miaj adopta filo kaj metilernanto. Se vi sekvos min por perlabori ĉie en la mondo, mi certigas al vi bonajn manĝaĵojn."

Antaŭ ol li finis sian parolon, aŭdiĝis trista kaj ekscitita kantvoĉo en la kaverno. Ĉe tio lia tuta korpo tuj anserhaŭtiĝis. La kantteksto eble estis la operteksto, kies komenco li aŭdis tiun tagon.

*Mi sopiras al vi juna heroo lertanta en ĉevalbatalo kaj verkado de poemoj,*
*mi vojaĝis kun vi en mond' spertante subĉielan vivon kaj milmiloj da mizeroj…*

La maljunulo apogis sian dorson kontraŭ kluztabulo. Alblovoj el la jutkampo filtriĝantaj tra tabulfendoj flugis super lia verto, kaj kelkaj grizaj haroj sur ĝi leĝere tremetis kontraste kun la senĉese saltantaj flamoj de karbo. Lia vizaĝo sin montris senlime sentplena, du delikataj mordmuskoloj sur liaj vangoj tordiĝis kiel lumbrikoj, kaj liaj okuloj vere similis al du ardantaj karbopecoj.

*…vi tute ne konsideron donas pri trijara kunvivado nia,*
*eĉ vi rigardas mian senton al vi kiel fekaĵon.*
*Mi svingas por vi ventumilon en someraj tagoj,*
*piedojn viajn mi varmigas en sezono vintra,*
*forgesas tamen vi aroman meloneton*
*kaj varmigan pelveton en la sin' donitajn de mi…*
*Nun kiel altrangulo, rajdas vi stalonon,*
*posedas dekmil muojn da fekundaj kampoj,*
*sed vi forlasas min por edziĝi kun riĉa ino.*
*Mizera la virino mi ja estas…*

Kun tre maltrankvila koro kaj duonmalfermita buŝo, la junulino senpalpebrume fiksrigardis iom levitan esprimriĉan vizaĝon de la maljuna forĝisto kaj la gorĝan pomon sur lia maldika kolo, kiu facile moviĝis supren aŭ malsupren kiel hidrarga globeto. Lia trista kaj melankolia kantritmo, kiel aŭtuna pluvo, vipadis la kampon en ŝia koro. Tuj antaŭ ol ŝi ekploris, lia melodio fariĝis impona kaj senlime etendiĝanta. Ŝia koro svingiĝis kiel salikbranĉo en vento, kaj samtempe ondo de sensentemo elŝprucis de ŝia spino ĝis ŝia verto. Pro tio ŝia korpo tre nature kliniĝis sur la ŝultron de la Eta Ŝtonhakisto. Kun briletaj larmeroj, ŝi ludis kun lia kaloplena manego, dronante en kanta teksto de la maljuna forĝisto. Lia marasma vizaĝo radiis per blindiga lumo, de kie ŝi ŝajnis trovi sian estontecon belan kiel la kanto…

Eta Ŝtonhakisto ameme brakumis ŝin kaj malpeze premis ŝian malmolan mamon per sia manego. La juna forĝisto sidis malantaŭ la knabo, sed tre baldaŭ li ne plu sidis senmove, aŭskultante la orelpikan azenecan iadon de la maljunulo. Post momento li eĉ ne povis aŭdi lian iadon. Li sidiĝis sur siaj kalkanoj, kun oblikve klinita kapo, sur kiu la maldekstra okulo preskaŭ vertikaliĝis. Lia rigardo ŝajnis ungo, kiu deŝiris kaj gratis sur ŝia vizaĝo. Kiam li milde metis sian manon sur ŝian bruston, la juna forĝisto naskis fajron en la ventro, kies flamoj sin ĵetis ĝis la gorĝo kaj elŝprucis el liaj naztruoj kaj buŝo. Li sentis, ke li kaŭras sur subpremita risorto, kaj se li iomete distriĝus, li estus pafita en aeron kaj kunfrapiĝus kontraŭ duonmetro-dika pontsurfaco el armita betono de la kontraŭinunda baraĵo. Li pene eltenis, kunpremante la dentojn.

La knabo tenis ambaŭmane la tir-stangon de la blovilo. La fajro en la fornego jam malfortiĝis, kaj nur strio da blua flamo kaj strio da flava flamo saltetis sur karba brulrestaĵo. Kelkfoje la flamoj estis levitaj de aerfluo alten super la fornego, kaj flosis en aero. Kiam homfiguroj skuiĝis, la flamoj falis malsupren. Li ne prenis ĉeestantojn en sian rigardon, kaj li provis rigardi per sola okulo unu flamon, tiel ke li tenu flavon en unu okulo kaj bluon en la alia, sed vane, ĉar li ne povis apartigi la rigardojn de ambaŭ okuloj. Pro tio li deprimite deturnis sian rigardon de la fajro kaj direktis siajn okulojn jen dekstren jen maldekstran. Subite li fiksis sian rigardon sur la amboson antaŭ la fornego. La amboso impone kuŝis, simile al monstro. La unuan fojon li larĝe malfermis sian buŝon kaj eligis suspiron (kiu estis supersonita en laŭta kaj sonora kantado de la maljuna

forĝisto). Tiam liaj okuloj, kiuj estis jam grandaj kaj brilaj, nun fariĝis des pli lumaj kiel elektra lumfonto. Antaŭ liaj okuloj aperis unika kaj bela bildo: sur glata kaj blubrila amboso metiĝas orkolora rafano kun formo kaj grandeco de piro kaj kun vosto plena je radiketoj similaj al oraj ŝafharoj; la rafano, pure travidebla kaj delikate strukturita, havas oran ŝelon, en kiu gravediĝas arĝenta viveca suko; ĝia konturo estas gracie bela kaj el ĝia arka linio flosas ora lumo, kies radioj aŭ longas kiel tritikaj aristoj aŭ mallongas kiel okulharoj, ĉiuj orkoloraj… la kantvoĉo de la maljuna forĝisto forpuŝite drivas tre malproksimen, sonante kiel muŝa zumo. La knabo ŝvebis preter la blovilo kiel ombro kaj haltis antaŭ la amboso. Li etendis sian maneton makulitan per koto kaj karbopolvo kaj vunditan pro martelado kaj bruligo, tremete… Tuj kiam li estis prenonta la rafanon, la juna forĝisto abrupte sin ĵetis al li. Tiu piedrenversis sitelon kaj akvo elfluis glugle, malseke invadante la pajlan liton de la maljuna forĝisto. Per unu ekpreno, li forkaptis la rafanon, kun la ununura okulo kongestita: “Fik, vi hundidaĉo! Virhundo! Hundino! Ĉu vi rajtas manĝi rafanon? Mi fajras en la ventro kaj fumas en la gorĝo, kaj mi bezonas ĝin por moderigi mian soifon!” Malfeminte sian buŝegon kun nigriĝintaj dentoj, li pretis manĝi ĝin. La knabo neordinare lerte saltis, enŝovis sin per ambaŭ brakoj en lian brakumon, momente pendigis sin en aero kaj tuj forglitis el lia brakumo, tiel ke la rafano falis sur la teron. La juna forĝisto donis solidan piedbaton al li. Tiu stumble falis en la sinon de la junulino kaj Eta Ŝtonhakisto stabiligis lin per la manoj.

Ĉesinte kanti raŭkvoĉe, la maljuna forĝisto malrapide stariĝis. Ankaŭ la junulino kaj Eta Ŝtonhakisto stariĝis. Ses okuloj fiksiĝis sur la junan forĝiston. La knabo sentis pro kapturno, ke ĉio ĉirkaŭ li turniĝadas, kaj li forte skuis sian kapon. Vidinte, ke la juna forĝisto volas enbuŝigi la rafanon refoje, li levprenis pecon da skorio kaj ĵetis ĝin al li. Ĝi flugis tuj preter ties vango, kunfrapiĝis kontraŭ kluztabulo kaj falis sur la liton de la maljuna forĝisto.

“Fik al via patrino! Mi batu vin ĝismorte!” muĝis la juna forĝisto.

Farinte paŝon antaŭen, Eta Ŝtonhakisto diris: “Ĉu vi volas tirani infanon?”

“Redonu la rafanon al li!” ordonis la maljunulino.

“Redoni ĝin al li? Neniel!” Elrapidinte ekster la kavernon, la juna forĝisto svingis sian brakon. La rafano elflugis antaŭen kun venta susuro, kaj post kelka tempo aŭdiĝis plaŭdado el la rivero.

Antaŭ la okuloj de la knabo aperis orkolora ĉielarko. Li mole falis inter la junulino kaj Eta Ŝtonhakisto.

## IV.

La orkolora rafano plumbe falis sur la riversurfacon kaj ŝprucigis akverojn. Ĝi drivis kelkan tempon kaj malrapide sinkis ĝis la riverfundo, sur kiu ĝi lante ruliĝis kaj tavolo post tavolo da flava sablo rapide kovris ĝin. De la riversurfaco, kie ĝi plaŭde falis, leviĝis densa nebulo. Ĉe la tagiĝo, la rivervalo pleniĝis je nebulo, sub kiu riverakvo ĉagrenite plorĝemis. Kelkaj anasoj, kiuj tre frue vekiĝis, staris ĉe la riverrando, melankolie rigardante la ruliĝantan nebulon. Unu el ili senpacience riskis ŝanceliri al la rivero. Antaŭ la prosperantaj akvoherboj ĝin blokis la densa nebulo kiel kulovualo. Ĝi strečis la kolon maldekstren aŭ dekstren aŭ antaŭen, sed la spongeca nebulo kontraŭstaris elaste, kaj ĝi vole nevole retroiris, plende kvakante. Poste la suno elŝoviĝis kaj tranĉis per siaj spadecaj radioj la nebulon en stratetojn kaj tunelojn. La anasoj vidis, ke, en tia strateto, alta maljunulo, ŝultroportante litaĵo kaj kelkajn pezajn feraĵojn, laŭiris la riveron

okcidenten. La maljunulo havis tre elstaran dorsoĝibon, kaj la peza ŝarĝo tiel forte subpremis lian ŝultron, ke lia kolo streĉiĝis kiel cigno. Lin sekvis brunhaŭta knabo kun nudaj torso kaj piedoj. La viranaso interŝanĝis rigardojn kun la anasino, signifante: Ĉu vi ankoraŭ memoras? Tiufoje estis li, kies sitelo puŝegiĝis kontraŭ salikarbo kaj ruliĝis en la riveron, kaj li mem ventrokuŝis sur la digo kiel hundo, kaj fine li enakviĝis kaj trenis la sitelon kun iom da restanta akvo, kaj la sitelo preskaŭ frakasis tiun senhontan tadornon… La anasino haste respondis: jes, jes, tiu abomeninda tadorno ĉiutage ĝenas min per obscenaj vortoj, ĝi ja meritas frakasiĝon…

Irante malrapide ĉe akvorando, la knabo penis travidi la malklaran nebulon. Li aŭdis anasojn brue kvakadi sur la transa bordo. Kaŭriĝinte, li apogis sian verton sur genuojn kaj ĉirkaŭprenis fridajn krurojn per ambaŭ manoj. Li sentis, ke la suno elvenas kaj varmigas lian dorson, kvazaŭ forĝista fornego ardus malantaŭ lia dorso. Nokte li ne reiris hejmen kaj dormis en pontkaverno. Ĉe kokkrio je tagiĝo, li aŭdis la maljunan forĝiston sonore diri kelkajn vortojn, kaj post tio ĉio reiris al silento. Ne plu endormiĝinte, li paŝis sur la glacie malvarma sabla tero al la riverbordo. Li vidis la ĝiban dorsfiguron de la maljuna forĝisto, sed kiam li volis lin postkuri, neatendite li stumblis kaj peze falis sur siajn sidvangojn, kaj apenaŭ li sin starigis, la maljuna forĝisto jam malaperis en malklaran nebulon. Nun li kaŭris, rigardante, ke la sunlumo tranĉas la nebulon kiel sojkazeon. Li vidis la anasojn sur la transa bordo, kaj tiuj lastaj ankaŭ digne rigardis lin. La senvualita akvosurfaco blindige brilis kiel arĝento. Pro tio, ke li ne povis vidi la fundon de la rivero, li sentis grandan malesperon. Li aŭdis ekbruadon sur la konstruejo. Vicdirektoro Suno Liu laŭtsone sakris: “Fik! Okazis io stranga en forĝejo! Sen permeso la maljunulaĉo foriris kun sia litaĵo kaj la friponeto ankaŭ malaperis senspure! Kiel oni sekvu disciplinon!”

“Nigra Knaĉjo!”

“Nigra Knaĉjo!”

“Ĉu tiu estas Nigra Knaĉjo? Jen, li kaŭras ĉe akvorando!”

La junulino kaj Eta Ŝtonhakisto alkuris kaj levis lin, prenante po lia brako.

“Kompatinduleto, kion vi faras, kaŭrante ĉi tie?” La junulino permane deprenis pajlerojn de sur lia verto, dirante: “Ne kaŭru ĉi tie. Estas tre malvarme.”

“Hieraŭ nokte ankoraŭ restis kelkaj batatoj. Petu al Unuokululo baki por vi.”

“Maljuna majstro jam foriris,” peze diris la junulino.

“Foriris.”

“Kion fari? Ĉu oni lasu lin sekvi Unuokululon? Se tiu turmentos lin?”

“Zorgu pri nenio. Ĉiajn ajn suferojn tiu ĉi knabo povas elteni. Kaj krome, mi certas, ke li ne riskos fari ion troan al la knabo, se ni pretos interveni.”

Subtenante la knabon, ili ambaŭ iris al la konstruejo. Kaj la knabo returnis sian kapon je ĉiu paŝo.

“Stultuleto, iru, iru. Kion interesan vi volas vidi?” Eta Ŝtonhakisto ekpinĉis lin je la brako.

“Mi pensas, ke vi hundidaĉo estas forportita de maljuna kato!” diris Suno Liu kontraŭ la knabo. Li demandis al la juna forĝisto: “Kio pri vi? Ĉar vi jam prenis rimedojn devigi la maljunulon foriri, vi ne devas prokrasti la laboron. Se vi ne sukcesos bone elhardi borilojn, mi elfosos vian solan okulon.”

La juna forĝisto ekridetis, dirante: “Atendu kaj vidu, Ĉefo Liu. Tamen mi postulas la porcion da greno de la maljunulo, alie mi ne konsentos.”

“Mi pririgardu vian majstrecon. Se vi taŭgas, estas bone, alie, ankaŭ vi forruliĝu malbenite!”

“Faru fajron, mia adopta filo,” la juna forĝisto ordonis al la knabo.

La tutan antaŭtagmezon la knabo, kvazaŭ perdinte sian animon, senorde agadis kaj fuŝe laboris. Kelktempe li enŝovis ŝovelilplenon da karbo en la fornegon, ke nigra fumo plenigis la pontkavernon. Kaj kelktempe li metis la kapojn de boriloj, anstataŭ ĝiaj pintoj, en la fornoventron, tiel ke tio, kio postulis ardiĝon, estis ne ardigita, dum tio, kio ne meritis ardiĝon, fandiĝis.

“Vin diablo prenu! Kien via animo forkuris?” kolere sakris la juna forĝisto. Ŝvitante tra tuta korpo, li okupis sin pri tio kaj alio, kaj ŝviteroj senĉese eksudis el liaj poroj pro lia alta energio prezenti lian bravuran majstrecon.

La knabo vidis, ke li etendis sian manon en la tinon por provi la akvan varmecon antaŭ hardado. La brulvundo sur lia brako estis bandaĝita per peco da ĉifono, ŝajne eligante haladzon de putriĝintaj fiŝoj kaj salikokoj. Kun maldika tavolo da delikata nebulo en la okuloj, la knabo aspektis deprimite. Post la naŭa, la suno fariĝis ekstreme bela, kaj fasko da lumo penetris en la malhelan pontkavernon, trafis la okcidentan rokmuron kaj reflektiĝis pompe en la tuta kaverno. Post kiam la juna forĝisto finis la hardadon de la boriloj, li persone portis ilin al la ŝtonhakistoj por kontrolo. Forĵetinte ilojn, la knabo ŝteliris el la kaverno. Subita heliĝo, samekiel subita mallumo, kapturnigis kaj blindigis lin. Post ioma hezito, li flugkuris. Dekkelkajn sekundojn poste, li jam staris ĉe la riverrando. Setariaj herboj kun kvareĝaj tigoj scivole rigardis lin, kaj kresoj kun purpuraj floroj kaj ciperoj kun kafkoloraj kapoj avide flaris la karbobrulan odoron el lia tuta korpo. Super la rivero flosis delikata aromo de akvaj herboj kaj malforta odoro de karpoj, kio movetis liajn naz-alojn kaj svingetis liajn pulmofoliojn similajn al vigle fluganta turto. La riversurfaco prezentis vastan blankon, intermiksitan kun nigro kaj purpuro. Kvankam li sentis pikan acerbecon en la okuloj, li absorbite koncentris sian rigardon sen movi la okulojn, kvazaŭ volante travidi la arĝentbrilan tavolon flosantan sur la akvo. Poste, tenante supren la subajn randojn de la kalsono per ambaŭ manoj, li esploreme enakviĝis kaj dance marŝis antaŭen. Komence la riverakvo nur atingis liajn genuojn, kaj baldaŭ liajn femurojn. Li forte refaldis supren la kasontubojn, montrante siajn du vinberkolorajn sidvangojn. Tiam li jam staris en la mezo de la rivero. La lumradioj ĉirkaŭ li ĉiuj pafiĝis al lia korpo, farbis ĝin kaj enŝoviĝis en liajn okulojn, tiel ke liaj nigraj okuloj fariĝis junverdaj kiel nematuraj bananoj sur la baraĵo. Rapidaj akvofluoj jen kaj jen atakis liajn femurojn. Kvankam li staris sur la malmola sabla fundo de la rivero, post nelonge la sablo tamen estis forlavita de la fluoj. Li staris pli malalte en la forlavita sabla kavo, kaj tute malsekiĝis lia kalsono, kies parto algluiĝis al liaj femuroj kaj la alia ŝveliĝis malantaŭ lia pugo, kaj la karbopolvo sur la kalsono nigrigis fluon. Sablo kirle leviĝis el sub liaj piedoj kaj karesis liajn krurojn. Du sukcenkoloraj akvogutoj pendis ĉe liaj vangoj kaj liaj buŝanguloj forte kontraĥiĝis. Li komencis iri en la rivermezo, esplorante kaj palpe serĉante per la piedoj.

“Nigra Knaĉjo, Nigra Knaĉjo!”

Li aŭdis la vokojn de la juna forĝisto antaŭ la pontkaverno.

“Ĉu vi volas morti, Nigra Knaĉjo?”

Li aŭdis la junan forĝiston atingi la akvorandon, kaj li ne returnis sian kapon kaj nur montris sian verdetan dorson al li.

“Venu supren!” La juna forĝisto elskrapis kotobulon kaj ĝin ĵetis al li. Ĝi tanĝis la hararon de la knabo kaj falis en la riveron, kaŭzante ovalan ondiĝon. Alia kotobulo alflugis kaj trafis lian dorson, tiel ke li sin ekĵetis antaŭen kaj liaj lipoj tuŝetis la akvon. Li sin turnis kaj plaŭde vadis al la akvorando. Plena je akvoperloj tra la tuta korpo, la knabo starigis sin antaŭ la junan forĝiston. Akveroj ruliĝis de sur lia haŭto, gutante serie kaj susure. Lia loza kalsono algluiĝis al lia korpo kaj lia kaceto erektiĝis rigide kiel pupo de silkraŭpo. Tuj kiam la juna forĝisto levis sian

ursopied-similan manegon kaj ĝin eksvingis, li subite sentis, ke lia koro estas ekgratita de kata ungeto, pro tio, ke la okuloj de la knabo fiksiĝis sur lia vizaĝo.

“Tuj iru ardigi fajron per blovilo! La boriloj harditaj de mi, via majstro, ne estas malsuperaj al tiuj de la maljunulaĉo!” Li fiere frapetis la knabon je la nuko.

Portempe ne troviĝis prilaboraĵo sur la fornego. La juna forĝisto bakis ĉirkaŭ ĝia rando la batatojn restantajn de hieraŭo. Denove la vento el la jutkampoj milde enbloviĝis kaj la sunlumo rekte pafiĝis en la pontkavernon. Per tenajlo turnadante la batatojn gudritajn pro bakado, la juna forĝisto fiere kantzumis: “*De Pekino al Nankino, oni neniam vidas, ke la elektra lampo estas tir-ŝaltita en pantalonforko.* Nigra Knaĉjo, ĉu vi vidis, ke la elektra lampo estas tir-ŝaltita en pantalonforko? En la pantalonforko de via adopta patrino elektra lampo tir-ŝaltiĝas…” Li kvazaŭ subite memoris ion kaj diris al la knabo: “Rapidu! Iru eltiri du rafanojn, kaj mi rekompencos vin per du batatoj, kiam vi revenos.” Ties okuloj ekbrilis. La juna forĝisto vidis, ke lia koro forte misbatis dufoje inter la ripoj. Antaŭ ol li volis ekparoli, la knabo jam forkuris kiel kuniklo.

Kiam la knabo surgrimpis la digon, li aŭdis la vokon de la junulino Lekanteto de malproksime. Li returnis sian kapon, sed la sunlumo blokis lian rigardon. Li malsupreniris la digon kaj enŝoviĝis en jutkampon. Jutplantoj kreskis malorde, nek en vico nek en sulko. En la dense prisemita loko ilia tigoj maldikis kiel fingroj aŭ krajonoj, dum en la maldense prisemita loko ili dikis kiel falĉil-teniloj aŭ homaj brakoj, ĉiuj kun sama alteco. Kiam li rigardis la jutkampojn starante sur la digo, tiuj etendiĝis kvazaŭ ondetiĝanta lago. Dum li dismetis dikajn aŭ maldikajn jut-tigojn kaj iris antaŭen, la malmolaj pikiloj sur la tigoj pikis lian haŭton kaj maturaj jut-folioj multenombre falis. Baldaŭ li atingis la lokon paralelan al rafan-kampo kaj turninte sin rektangule, iris okcidenten. Proksime, li kuŝigis sin surventre kaj malrapide rampis antaŭen. Baldaŭ li vidis la kampon plenan je malhele verdaj folioj de rafanoj. Interspace de rafan-folioj sin montris ruĝaj rafanoj sub la sunlumo. Tuj kiam li volis elrampi el la jutkampo, li retiriĝis. Maljunulo, rampante inter la sulkoj de rafanoj, elprenis el la sako tritikgrajnojn kaj punkte plantis ilin inter la sulkoj. Sub la arda aŭtuna suno, lia spino sub blanka vesto ŝvite malsekiĝis kaj polvo levita de venteto kotkolorigis la malsekigitan lokon. La knabo genue retiris sin kelkajn paŝojn. Kuŝante surventre sur la tero, li ripozigis sian mentonon sur la brakoj kaj rigardis tiujn rafanojn tra la interspaco de jut-tigoj. En la rafankampo sennombraj ruĝaj okuloj rigardis lin kaj tiuj rafanfolioj dummomente fariĝis ebon-nigraj haroj, moviĝantaj kiel plumoj de flugbirdoj…

Ruĝvizaĝa viro aliris grandpaŝe el la batatkampo kaj haltis malantaŭ la maljunulo, subite demandante: “He, maljunulo, ĉu vi diris, ke vi estas priŝtelita lastnokte?”

La maljunulo tuj leviĝis konfuzite kaj respondis kun pendantaj brakoj: “Jes, ses rafanoj estas forŝtelitaj, sed iliaj foliaroj restas, kaj ok grapoloj da batatoj forŝtelitaj, sed restas iliaj rampaj tigoj.”

“Mi timas, ke ilin forŝtelis tiuj malbenitaj konstruantoj de la baraĵo. Estu iom singardema kontraŭ ili. Revenu por tagmanĝo pli malfrue.”

“Mi jam aŭdis, grupestro,” diris la maljunulo.

La knabo kaj la maljunulo okule sekvis la ruĝ-vizaĝan viron ĝis li suriris la digon. La maljunulo sidiĝis en la rafan-kampo, alfronte al la knabo. Tiu panike refoje retiris sin je kelka distanco. Tiam lia rigardo estis barita de densaj jut-tigoj.

“Nigra Knaĉjo!”

“Nigra Knaĉjo!”

Starante sur la digo, Eta Ŝtonhakisto kaj la junulino vokadis al la jutkampoj, kun iliaj dorso al

la suno. La sunlumo banis la homamason disiĝantajn post laborhoro.

“Mi vidis lin enŝoviĝi en jutkampon, kaj mi supozis, ke li volas pisi aŭ feki tie,” la junulino diris.

“Ĉu Unuokululo tiranis lin refoje?” dubis Eta Ŝtonhakisto.

“Nigra Knaĉjo!”

“Nigra Knaĉjo!”

Ilia dueta vokado hirunde glitis tuj super la pintoj de jutplantoj, surprize flugigante alten la paserojn, kiuj estis kaptantaj grizajn tineojn sur la plantaĵaj pintoj, kaj kiuj ree falis post longe. Starante antaŭ la kaverna aperturo, la juna forĝisto rigardis per sia sola okulo la paron starantan ŝultron ĉe ŝultro, kaj li eksentis pligrandiĝon de koleremo en la ventro. Antaŭ momento, kiam ili venis serĉi la knabon, iliaj mienoj kaj dirmanieroj ŝajnis, ke ili serĉas sian propran infanon. “Atendu kaj vidu, vi bastardoj!” li minace diris mallaŭte.

“Nigra Knaĉjo! Nigra Knaĉjo!”

La junulino diris: “Mi timas, ke li dormas en jutkampo.”

“Ni iru pririgardi?” Eta Ŝtonhakisto peteme rigardis al la junulino.

“Ni iru? Ni iru.”

Manon en mano, ili malsupreniris la digon kaj enŝoviĝis en jutkampon. Sekvante ilin, la juna forĝisto rapidis sur la digon. Li vidis, ke la jutfolioj ondadas kun krakado de jut-tigoj. Aŭdiĝis la vokado de la gejunuloj por serĉi la knabon, kaj la kria voĉo albloviĝis kvazaŭ el sub la akvo…

Pro laceco dum longtempa surventra kuŝiĝo, la knabo, eliginte elspiron de faciliĝo, sin turnis kaj surdorse kuŝiĝis. Sub li etendiĝis sabla tero, sur kiu sterniĝis maldika tavolo da falintaj jut-folioj. Li metis ambaŭ manojn sub la kapon, kun la ventro profunde enkaviĝinta. Flava folio kun ruĝa makulo sur ĝi flirte falis kaj ŝirmis lian umbilikon plenan je karbopolvo. Rigardante supren, li vidis unu dikan kaj unu maldikan bluajn lumstriojn filtriĝi tra la fendoj inter jut-folioj, kiuj flirtis kiel orkoloraj paseroj kaj kiuj kelktempe similis al aro da tineoj, makuletoj sur kies flugiloj ĝoje saltetis kiel brunaj floroj de rafanoj en liaj okuloj.

“Nigra Knaĉjo!”

“Nigra Knaĉjo!”

La konata voĉo vekis lin el sonĝrevo. Li sidigis sin kaj ekskuis la dikan jutplanton apud li.

“Ĉu li jam endormiĝis, tiu infano?”

“Ne povas esti, ĉar ni tiel laŭte vokadas lin. Li certe ŝteliris hejmen.”

“Tiu etuleto…”

“Ĉi tie estas vere bone…”

“Jes…”

Ilia voĉo pli kaj pli mallaŭtiĝis, kvazaŭ du fiŝoj elvomus bobelojn. La knabo eksentis delikatajn elektrajn kurentojn trairi la korpon. Kun ioma nervozeco, li ekgenuis, streĉis la orelon kaj celis sian rigardon, kaj fine lia rigardo trapenetris diversajn obstaklojn kaj atingis la malklarajn homfigurojn de liaj geamikoj distranĉitajn de jut-tigoj. En morta silento sur la jutkampo fulmis venteto, kiu skuis jutfoliojn, sed ne tigojn. Kiam kelkaj folioj estis falantaj, la knabo aŭdis ilin vibrigi la aeron. Kun miro kaj scivolemo, li vidis purpurruĝan kaptukon leĝere fali sur jut-tigojn kaj kroĉiĝi al pikiloj sur la tigoj, kvazaŭ disvolvitan silentan flagon, kaj ruĝan kvadratitan veston fali sur la teron. La vastaj spacoj da jutplantoj onde svarmis al li. Stariĝinte, li turnis sian dorson al ili kaj rekte marŝis antaŭen, sentante ion neordinaran violente puŝiĝi interne.

# V.

Dum sinsekvaj dekkelkaj tagoj, la junulino kaj Eta Ŝtonhakisto ŝajne forgesis la knabon kaj ili ne plu kune iris al la pontkaverno por vidi lin. Je tagmezo kaj vespero, kiam la knabo aŭdis melodian pepadon de alaŭdo en jutkampo, sur lia vizaĝo alnaĝis malvarma rideto, kvazaŭ li scius, kion la birdo krie aludas. La juna forĝisto rimarkis la alaŭdan pepadon kelkajn tagojn malpli frue ol la knabo. Sin kaŝante en la pontkaverno, li zorgeme observis kaj fine trovis la sekreton: se nur alaŭdo pepas, oni povas trovi Etan Ŝtonhakiston nenie, kaj kun maltrankvileco, la junulino Lekanteto, ĉirkaŭrigardinte, forĵetas martelon kaj ŝteliras; nelonge post ŝia foriro, la alaŭdo ĉesas pepi. Tiam la mieno de la juna forĝisto fariĝis pli malĝoja kaj lia humoro pli flamiĝema. Li komencis drinki. La knabo ĉiutage transpasis la ŝtonponton kaj aĉetis botelon da alkoholaĵo el batatoj ĉe la butiko de la vilaĝo.

Tiun nokton lunlumo klare brilis kaj alaŭdo ree pepis. Varma vento el jutkampoj, kiel milda amo, blove atakis la konstruejon. Firme tenante botelon, la juna forĝisto englutis duonbotelon da alkoholaĵo per unu tiro, tiel ke liaj okuloj pleniĝis de larmoj pro alkohola forto. Pro tio, ke vicdirektoro Suno Liu hejmeniris okupiĝi pri la aferoj por edziĝo de sia filo, la laborantoj sur la konstruejo ne emis labori. Ŝtonhakistoj, kiuj laboris je kromaj horoj dum nokto, plejparte duonkuŝis fumante en pontkaverno. Pro tio ne boriloj necesis esti riparitaj kaj la fajro ĉe forĝista fornego malforte saltetis.

“Nigra Knaĉjo… iru, eltiru kelkajn rafanojn por mi…” Kun alkoholaĵo brulanta en sia stomako, la juna forĝisto sentis fajron ŝprucontan en la buŝo.

La knabo staris rigide kiel stango ĉe la blovilo, rigardante lin.

“Ĉu vi atendas miajn pugnobatojn? Iru…”

Sub lunlumo, la knabo ĉirkaŭiris la jutkampon senlime misteran banitan en lunlumo, trairis la multekoloran batatkampon kaj atingis la rafankampon kun lulanta dezerta miraĝo. Kiam li, tenante rafanon en la mano, reiris al la pontkaverno, la juna forĝisto jam ronkis en dormo, oblikve kuŝante sur lito. Metinte la rafanon sur la amboson, la knabo volis ardigi la fajron de la fornego per siaj tremantaj manoj, sed li neniel povis produkti bluan kaj flavan flamojn spiralantajn en aero. Li pririgardis de diversaj flankoj la rafanon sur la amboso. Ĝi tamen, ŝajne kovrita per ruĝa ĉifono, tre malplaĉis al okuloj. Li mallevis sian kapon deprimite.

Tiun nokton la knabo nebone dormis. Kuŝante en pontkaverno, li turniĝadis de flanko al flanko. Ĉar vicdirektoro Liu forestis, ĉiuj laborantoj hejmeniris por dormado. En la pontkaverno nur restis maldika tavolo da pajloj por dormantoj. Lunlumo oblikve penetris en la pontkavernon kaj disŝutis siajn klarajn radiojn en ĝin. Riverbruo, susurado en la jutkampo, ronkado de la juna forĝisto dormanta en la okcidenta pontkaverno kaj aliaj nenomeblaj voĉoj ĉiuj svarmis en liajn orelojn. La pajloj sur ŝtonoj jen kaj jen pikis liajn okulojn. Li kolektis ĉiujn pajlojn kaj faris dunecan amason. Li enŝoviĝis en ĝin, sed vento ankoraŭ povis penetri tra inter pajloj. Li firme kuntiriĝis kaj ne kuraĝis moviĝi. Li volis dormigi sin, sed li ne sukcesis endormiĝi. Li ĉiam pensis pri la rafano. Kia rafano ĝi estas! Orkolora kaj travidebla. Jen li staras en la riverakvo jen en rafankampo, kaj li serĉas, serĉas…

La sekvantan matenon, antaŭ ol la suno elvenis kaj la luno ankoraŭ ne perdis siajn lumbrilojn, aroj da nigraj korvoj panike kriante preterflugis super la konstruejo, forlasante siajn malpurajn plumojn sur la konstruejo. Sur la orienta horizonto stariĝis strekegoj da grizaj nuboj kiel arbegoj,

sur kies branĉoj plene pendiĝis ĉifonaj tolrubandoj. Apenaŭ la knabo eliris el la kaverno, li ekhavis malvarmecon tra la korpo, la saman senton, kiu li spertis antaŭ kelkaj tagoj kiam li suferis de malaria trememo. Hieraŭ vicdirektoro Liu revenis kaj inspektis la konstruejon. Li ekrajdis siajn altajn ĉevalojn kaj insultis ĉiujn laborantojn. Pro tio, hodiaŭ oni venis tre frue kaj laboris kun granda peno. Sonoj de martelado sur la konstruejo sonoris kiel kvakado de ranoj en la lago. Hodiaŭ multiĝis la boriloj, kiuj bezonis riparadon. La juna forĝisto, kun granda seriozeco, laboris rapide kaj brile. La ŝtonhakistoj, kiuj venis preni borilojn, ne ŝparis laŭdojn al li, dirante, ke lia kapablo de hardado jam superas tiun de lia maljuna majstro, kaj ke la boriloj harditaj de li, akraj kaj tenacaj, hakas ŝtonojn efike.

Kiam la suno leviĝis iom alten, Eta Ŝtonhakisto portis du borilojn por riparado, du novajn borilojn, kiuj kostis po kvar-kvin juanoj. La juna forĝisto ĵetis malvarman rigardon al Eta Ŝtonhakisto kun radianta mieno, sed tiu lasta ne perceptis tion, ĉar feliĉaj okuloj vidis nur feliĉecon. La knabo eksentis internan timon, rimarkinte, ke la forĝisto mistifikos Etan Ŝtonhakiston. La juna forĝisto varmigis la du borilojn arĝente inkandeskaj, malzorgeme pintigis ilin per martelado kaj tuj trempis ilin tutajn en la akvon…

Eta Ŝtonhakisto forportis ilin, kaj la juna forĝisto montris fieran rideton ĉe la buŝangulo. Palpebruminte al la knabo, li diris: “Diablo prenu lin! Ĉu li rajtas uzi la borilojn harditajn de mi? Filo mia, ĉu li rajtas?” La knabo retiriĝis en angulon, forte tremante. Post kelka momento, Eta Ŝtonhakisto revenis kaj ĵetis la du borilojn antaŭ la junan forĝiston, insultante: “Unuokululo, kiel diable vi hardis ilin?”

“Diablo prenu vin! Pro kio vi krias?” diris la juna forĝisto.

“Jen, malfermu vian solan okulon por rigardi!”

“Viaj boriloj ne estas bonkvalitaj.”

“Fik! Vi intence priludas min.”

“Kiel do vi povas agi, se mi priludas vin? Mi ekkoleriĝas je ekvido de via figuro!”

“Vi, vi…” Morte paliĝinte pro kolero, Eta Ŝtonhakisto diris: “Elvenu, se vi estas bravulo!”

“Ĉu mi timas vin!” Deŝirinte oletukon ĉirkaŭ la talio, la juna forĝisto elpaŝis nudedorse kiel bruna urso.

Starante sur la sablejo antaŭ la baraĵo, Eta Ŝtonhakisto demetis jakon kaj ruĝan sportveston, kaj restigis nur veŝton sur la korpo. Kvankam li aspektis kiel malforta pedanto, li estis altkreska kaj fortika kiel arbo. La juna forĝisto, ankoraŭ kun du kontraŭbrula oletukoj sur la piedoj, knare tretis akrajn ŝtonpecojn sur la tero. Li havis longajn brakojn, kurtajn femurojn kaj muskoloriĉan torson.

“Ĉu interbati ĝentile aŭ perforte?” malestime demandis la juna forĝisto.

“Laŭ via plaĉo,” ankaŭ malestime respondis Eta Ŝtonhakisto.

“Pli bone vi reiru hejmen peti de via patro skriban ateston, ke mi ne kompensu, se mi batmortigos vin.”

“Pli bone vi hejmeniru prepari la ĉerkon.”

Insultante, ili alproksimiĝis vidalvide. La knabo kaŭris malproksime, senĉese tremante. En liaj okuloj, la komenca interbatalo ŝajnis infanludo. Eta Ŝtonhakisto sputis salivon al la vizaĝo de la juna forĝisto, kaj tiu eksvingis sian longan brakon por pugnobati, sed la pugno maltrafis lin, kiu evitis. Denove salivosputado, alia pugnobato, evitado, maltrafo. Tamen antaŭ ol Eta Ŝtonhakisto sputis salivon triafoje, la pugno de la juna forĝisto atingis lian ŝultron kaj lia korpo kontraŭvole faris turnon.

Surprizite oni ilin ĉirkaŭis de ĉiuj flankoj, kriante: “Ne interbatu, ne interbatu.” Sed neniu elvenis disigi la interbatantojn. Poste eĉ paciga krioj malaperis. Kun larĝigitaj okuloj kaj retenata spiro, oni spektis, kiel ili, kun malsamaj staturoj, luktas per forto. La junulino Lekanteto, kun pala vizaĝo, firme tenis la ŝultron de apudstaranta junulino. Kiam ŝia amato ricevis pugnobaton de la juna forĝisto, ŝi mallevis la kapon kaj eligis ĝemojn, kun okuloj similaj al disfloranta krizantemo.

Estis malfacile decidi, kiu estis la gajninto. Ili interŝanĝis pugnobatojn. Altkreska Eta Ŝtonhakisto donis belajn kaj graciajn pugnobatojn, kiuj efektive efikis malplene, ornamece kaj malforte, dum la juna forĝisto, iom malrapidmove, pugnobatis forte kaj solide. Kiam tia lia pugnobato trafis Etan Ŝtonhakiston, tiu nevole ronde turnis sian korpon. Poste la juna forĝisto ricevis pugnobaton kaj eksentis iom da kapturniĝo. Eta Ŝtonhakisto, profitante tiun ŝancon, sin ĵetis kaj sone batis lian korpon per pluvo da pugnobatoj. La juna forĝisto ekkurbigis sian korpon, ensoviĝis sub lian akselon, kaj ĉirkaŭprenis lian talion per siaj longaj brakoj kiel angiloj. Eta Ŝtonhakisto haste kunpremis lian kapon subaksele. Ili ambaŭ paŝis antaŭen, retropasis, retropasis, paŝis antaŭen refoje. Eta Ŝtonhakisto ne povis persisti kaj falis surdorse sur la teron.

Rigardantoj eksplodis per ovacio.

La juna forĝisto, ekstarinte, sputis sangan salivon, kun flanken klinita kapo, kiel venkanta koko.

Leviĝinte, Eta Ŝtonhakisto sin ĵetis al li. Blanka kaj nigra korpoj ree kuniĝis. Ĉifoje Eta Ŝtonhakisto klinis sian korpon pli malalten, por ke la rivalo ne sukcesu ataki lian suban parton de la korpo. Kvar brakoj firme interplektiĝis. Kelkfoje Eta Ŝtonhakisto levis lin kaj turniĝadis ronde, sed li ne povis faligi lin teren. Li anhelis, ŝvitante tutkorpe, dum la juna forĝisto elverŝis neniun guton da ŝvito. Pro manko de sufiĉa forto, Eta Ŝtonhakisto faris kelkajn mispaŝojn kaj ekhavis malklaran vidon. Je ioma malatento, liaj brakoj estis dismetitaj, kaj lia rivalo firme strangolis lian talion, ke li ne povis elspiri regule. Refoje li surdorse falis teren.

En la tria rundo, Eta Ŝtonhakisto fiaskis des pli mizere. La juna forĝisto enŝoviĝis sub lian intergambon kaj ĵetis lin eĉ du metrojn malproksime.

Plorante, Lekanteto alrapidis kaj helpis al Eta Ŝtonhakisto leviĝi. En ŝia plorado, la ĝojmieno de la juna forĝisto tuj malaperis kaj melankolio rampis sur lia tuta vizaĝo. Li staris en stuporo. Leviĝinte, Eta Ŝtonhakisto forsvingis ŝian manon, kaptis manplenon da sabla koto kaj ĵetis ĝin cele al lia vizaĝo. Kun sia sola okulo blindigita de sableroj, la juna forĝisto hurladis kiel sovaĝa besto, forte frotante siajn okulojn. Profitante la okazon, Eta Ŝtonhakisto sin ĵetis, strangolis lian kolon, subpremis lin sur la teron kaj tambure pugnobatis lian kapon…

Ĉe tiu momento, el inter femuroj de rigardantoj elŝoviĝis nigra ombro. Li estis Nigra Knacĵo. Kiel birdego li flugis malantaŭ la ŝtonhakiston, kaj kaptinte liajn vangoj per siaj nigraj manoj similaj al kokaj ungoj, li forte tiris ilin malantaŭen. La ŝtonhakisto, kun kunpremitaj dentoj kaj miena grimaco, blekadis “aj! aj!”, kaj peze falis teren ankoraŭfoje.

Barakte sidiginte sin, la forĝisto kaptis dispecigitajn ŝtonerojn per ambaŭ manegoj kaj ĵetis ilin ĉirkaŭen. “Besto! Hundo!” Sakrado kaj ŝtoneroj hajle falĉis la ĉirkaŭantajn rigardantojn, kiuj panike evitis. Lekanteto subite eligis tristan ekkrion. La manoj de la forĝisto ĉesis moviĝi, kvazaŭ li mortus. La sableroj en lia sola okulo jam estis alportitaj de larmoj al la okulangulo, ke la pupilo riveliĝis. Li malklare vidis, ke en la dekstra okulo de la junulino enŝoviĝis blanka ŝtonpeco kiel orelfungo elkreskinta el ŝia okulo. Eliginte strangan ekkrion, li mane ŝirmis sian okulon kaj mizere tordiĝis sur la tero.

Aŭdinte la tristan ekkrion de la junulino, la knabo malstreĉis sian tenon. Liaj fingroj elgratis

sur la vangoj de la ŝtonhakisto du vicojn da sanga spuro miksita kun karbopolvo. En panika tumulto de la rigardantoj, li ŝtele enkuris la pontkavernon. Kaŭrante en la plej malluma angulo, li, kun dentoj klakantaj, kaŝe rigardis konsternite tumultantaj homoj sur la konstruejo.

# VI.

La postan tagon Eta Ŝtonhakisto kaj la junulino Lekanteto malaperis el la konstruejo. Peze subprema etoso regis super ĝi. La suno tremtis kiel konvulsiulo, alblovoj de malvarma aŭtuna vento ondigis jutplantojn, kaj aroj da paseroj terurigite ĉirpis sur la pintoj de jutplantoj. La vento trairis pontkavernojn, levis alten polvon kaj flave farbis la duonon da ĉielo. Je la naŭa, la vento ĉesis kaj la suno malrapide renormaliĝis.

Vicdirektoro Suno Liu, kiu ĵus revenis de la geedziĝa ceremonio de sia filo, renkontis tiujn okazaĵojn kaj naskis koleran fajron en la koro. Starante ĉe la fornego, li pluvigis insultojn sur la junan forĝiston kaj asertis, ke li volos elfosi lian solan okulon por kompensi la difektitan okulon de la junulino Lekanteto. La juna forĝisto tenis sin senparola. La aknoj sur lia nigra vizaĝo ruĝiĝis pro subpremado al lia kolereksplodo. Anhelante, li drinkis per longaj tiroj.

Ŝtonhakistoj, puŝataj de nekonata forto, laboris tiel energie, ke amaso da ŝtalaj boriloj malakriĝis kaj atendis riparadon ĉe la forĝista fornego. La juna forĝisto kurbiĝis kiel salikokego sur la pajla lito, enverŝante alkoholaĵon en sian buŝon. En la pontkaverno saturiĝis nazpika malbonodoro de alkoholaĵo.

La vicdirektoro eksplodis per kolero. Piedbatante lin, li sakris: “Ĉu vi timas? Ĉu vi ŝajnigas vin mizera? Ĉu vi opinias, ke nenio okazos, se vi afektas esti morta kuŝante? Leviĝu kaj riparu tiujn borilojn, tiel ke vi povos fari meritojn kontraŭ viaj fiagoj.”

La juna forĝisto ĵetis alten la botelon, La botelo kunfrapiĝis kontraŭ la ponta suba surfaco kaj brue disrompiĝis. La pecoj de la botelo miksita kun alkoholaĵaj gutoj pluvis sur la kapon de la vicdirektoro. Saltleviĝinte, la forĝisto elkuris ŝanceliĝe, kriante: “Kion mi timas? Mi timas nek la ĉielon nek la teron. Kion alian mi timas?” Li surgrimpis la kontraŭinundan baraĵon kaj daŭre kriegis: “Neniun mi timas!” Liaj femuroj puŝiĝis kontraŭ la ŝtonaj balustradoj, kaj li ŝanceliĝis.

Iu averte kriis sub la ponto: “Vin gardu kontraŭ falo de sur la ponto, juna forĝisto!”

“Fali de sur la ponto?” La forĝisto eksplodis per ridego. Ridegante, li surgrimpis la ŝtonan balustron kaj, malstreĉinte sian mantenon, altaspirite starigis sin sur ĝi. La rigardantoj sub la ponto, kvazaŭ sorĉite, eĉ ne kuraĝis laŭte spiri pro konsterniĝo.

Li disetendis siajn brakojn kaj svingis ilin supren kaj malsupren kiel du flugilojn. Li komencis iri sur la mallarĝa balustrado, ŝanceliĝante. Li rapidigis sian iradon kaj eĉ kuretis. La rigardantoj ŝirmis per manoj siajn okulojn konsternite kaj poste demetis siajn manojn por vidi.

Li tange kaj ŝanceliĝe kuris sur la balustrado. Sube la griz-blua riverakvo respegulis lian deformitan figuron. Li kuradis de orienta fino al la okcidenta kaj reen, kantante: “*De Pekino al Nankino, oni neniam vidas, ke la elektra lampo estas tir-ŝaltita en pantalonforko, ge li long ge li ge long, li ge long, li ge long. De Pekino al Nankino, oni neniam vidas, ke katapulto estas ludita en pantalonforko…*”

Kelkaj aŭdacaj ŝtonhakistoj kuris supren de la baraĵo kaj tiris lin malsupren. Penege baraktante, li sakris: “Ne zorgu pri mi, vi malbenitaj. Mi estas elita akrobato. En filmo tiuj junulinoj dancas sur ŝnuro, kaj mi iras sur balustrado de la baraĵo. Diru al mi, kiu diable estas pli

kompetenta…”

Fine, spiregante pro granda peno, kelkaj tiris lin en la pontkavernon. Li paraliziĝis sur la teron kiel kotmason. Elvomante blankan saŭmon, li tiradis sian gorĝon, plore kriante: “Panjo mia, mi ekstreme suferas. Nigra Knaĉjo, mia metilernanto, savu vian majstron. Iru eltiri rafanon por mi…”

Oni subite trovis, ke la knabo surportas grandan veston, kiu eĉ kovras lian pugon. La vesto estis nova kaj el dika kaj peza dreliko, kiu ne povis estis eluzita eĉ kvin jarojn pro sia uz-rezisteco. Lia kalsono elmontris nur mallongan parton, kvazaŭ punto de la vesto. Liajn piedojn kovris paro da novaj kaŭĉukaj ŝuoj. Pro trograndeco de la ŝuoj, li devis strikte kunligi la laĉojn, tiel ke la ŝuoj ŝajnis du graskapaj katfiŝoj.

“Ĉu vi aŭdis, Nigra Knaĉjo? Kion via majstro volas vin fari?” diris maljuna ŝtonhakisto, pikinte lian dorson per piptubo.

La knabo eliris el la pontkaverno, supreniris la baraĵon kaj enŝoviĝis en jutkampon. Tie malklare videblis vojeto kaj juttigoj jam estis dismetitaj flanken. Li haltigis siajn piedojn. Ĉi tie granda spaco da jutplantoj kuŝis sur teron, kvazaŭ oni ruliĝis sur ĝi. Frotante siajn okulojn per mandorso, li eligis plorsingulton kaj daŭre iris antaŭen. Post kelka tempo, li kuŝigis sin surventre kaj enrampis en la rafankampon. Sen vidi tiun malgrasan maljunulon, li rektigis sin kaj iris en la mezon de la kampo. Kaŭriĝinte, li vidis, ke la punkte plantitaj tritikoj inter sulkoj de rafanoj jam montris siajn purpur-ruĝajn ĝermojn. Genuinte, li eltiris rafanon, kies maldikaj radiketoj kaj grundo eligis sonon kiel tiun de akvobobelo krevanta. Zorgeme li aŭskultis la sonon ĝis ĝi flugis en aeron. Sur la ĉielo troviĝis neniu nubero kaj la ĉarma aŭtuna suno senbare ĵetis siajn radiojn malsupren. Levante la rafanon en la mano, la knabo observis ĝin kontraŭ la sunlumo. Li esperis, ke li povu vidi la unikan kaj belan bildon, kiun li vidis el la amboso tiun nokton, kaj ke la rafano en la sunlumo povu esti kristale travidebla same kiel tiu kuŝanta en riverakvo kaj eligi orkoloran haloon. Sed tiu rafano lin malesperigis. Ĝi aspektis nek travidebla nek delikate formita, kaj li ne vidis la orkoloran haloon, des malpli la moviĝeman arĝentan likvon envolvitan de la orkolora haloo. Li eltiris alian rafanon, levis ĝin kaj observis ĝin kontraŭ la sunlumo. Refoje li malesperiĝis. Postaj aferoj fariĝis simplaj: li surgenue iris unu paŝon, eltiris du rafanojn, levis ilin, pririgardis ilin, forĵetis ilin, kaj surgenue iris alian paŝon, eltiris, levis, pririgardis, forĵetis…

Kun okuloj similaj al malklaraj akvogutoj, la maljunulo gardanta la kampon kaptis borantojn, kaŭrante en la brasika kampo. Li pinĉimortigis la kaptitajn borantojn unu post alia. Proksime al tagmezo, li stariĝis kaj volis veki la grupestron, kiu dormis en la ĉambro de la korto instalita por protekte superrigardi kampojn. Tiu dormis tie pro tio, ke li malbone dormis dum nokto kaj ne povis kompensi sian dormon en malkvieta vilaĝo, sed la korto estis taŭga loko por dormi en akompano nur de mallaŭta ĉirpado de aŭtunaj insektoj. Kiam la maljunulo rektigis sian talion, li aŭdis krakadon de sia spino. Li malklare vidis la rafankampon vaste ruĝa, kvazaŭ plenan je fajraj flamoj tie. Viziere ŝirmante siajn okulojn per mano, li rapidpaŝe iris antaŭen rekte en la rafankampon. Tiam li vidis, ke tiu vasta ruĝo konsistas el eltiritaj rafanoj ankoraŭ nematuraj.

“Kia malbonfaranto!” ekkriegis la maljunulo. Li vidis, ke knabo pririgardas levitan rafanon kontraŭ la sunlumo. La okuloj de la knabo estis tiel grandaj kiel brilaj, kiuj pikis la koron de la rigardanto. Sed la maljunulo senĝentile kaptis lin, starigis lin, trenis lin al la korto kaj vekis la grupestron.

“Malbone, grupestro, duonon da rafanoj ĉi tiu ursido eltiris.”

La grupestro, kun dormemaj okuloj, kuris al la rafankampo pririgardi. Reveninte kun feroca

mieno, li donis solidan piedbaton al la sidvangoj de la kanbo, pro kio tiu povis levi sin post longa tempo. Kaj krom tio, antaŭ ol tiu tute sobriĝis, li frapis lin je la vango.

“De kiu vilaĝo vi devenas, vi bastardo?”

La konfuzitaj okuloj de la knabo pleniĝis je larmoj.

“Kiu instigas vin al malbonfarado?”

Liaj okuloj fariĝis puraj kiel akvo.

“Kiel vi nomiĝas?”

Liaj okuloj onde brilis.

“Kiel via patro nomiĝas?”

Du vicoj da larmoj perlis el liaj okuloj.

Liaj lipoj moviĝetis.

“Grupestro, bonvole liberigu lin,” petis la malgrasa maljunulo.

“Liberigi lin?” Ridetante, la grupestro diris: “Mi ja liberigos lin.”

La grupestro deŝiris de la knabo la novan veston, novajn ŝuojn kaj kalsonon kaj volvinte ilin, ĵetis ilin al la murangulo. Poste, li diris: “Hejmeniru diri al via patro, ke li venu repreni la vestaĵojn. For!”

Sin turninte, la knabo foriris. Komence li kovris sian kaceton per mano, kvazaŭ honteme, kaj post kelkaj paŝoj li lasis la manon for. Rigardante la nudan knabon, la maljunulo ekplorsingultis.

La knabo enŝoviĝis en la jutkampon, kiel fiŝo naĝis en la maron. Folioj de jutplantoj susure tremis kaj la aŭtuna suno disverŝis brilajn radiojn.

Nigra Knaĉjo—Nigra Knĉjo—

**(Fino)**